XXIIIa jaro. Nº 324-325 (8-9) ☆ Monata ☆ Aŭgusto-Septembro 1927

ESPERANTO

Oficiala organo de UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

FONDINTO: HECTOR HODLER GVIDANTO: D-ro EDMOND PRIVAT
ADRESO DE LA REDAKTEJO KAJ ADMINISTREJO: 12, BOULEVARD DU THÉÂTRE, GENÈVE
La Redaktejo ne povas resendi manuskriptojn. Lasta dato por ricevo: la 15a de ĉiu monato. Oni skribu tre legeble kaj konservu kopion.

JARA ABONO

Simpla abono	10.— Fr. Sv.
Kun la membreco de UEA	12.50 Fr. Sv.
Unu numero	1.— Fr. Sv.

Svisa poŝtĉeko I. 2310. — La abonoj komenciĝas en Januaro

☆

REKLAMO

Anonco (unu centimetra kolonero)	2.50 Fr. Sv.
Anonceto (1 linio: 10 vortoj)	0.75 Fr. Sv.
Korespondado (1 enskribo)	1.— Fr. Sv.

ENHAVO

La festita jubileo, Edmond Privat (145). — *XIX-a Universala Kongreso de Esperanto* (146—158). — *Radio* (158). — *En kelkaj linioj* (158).

El naturo kaj sciencoj: *Persa fervojo* (159—160). — *Notoj* (160).

Literaturo: *Libertempo* (161). — *Ruĝaj kandeloj* (161—162). — *Tra la libraro* (162—163). — *Novaj libroj* (163—165). — *Esperanto en la praktiko* (165).

Tra la mondo esperantista: *Saluto de la lerneja Esperanto-klaso Gohlis-Dresden al vizitantaj gesamideanoj* (166). — *Centra Dana Esperantista Ligo* (166—167). — *Esperantista vivo.* (167). — *Laŭvola enkonduko de Esperanto en la pli altajn kaj mezajn lernejojn de la Saarteritorio* (168). — *La soveta poŝto honoras la kreinton de Esperanto per eldono de poŝtmarko* (168). — *Oficiala informilo de UEA* (169—170). *Svisa Esperanto-Societo* (170) — *Niaj mortintoj* (171). — *Amuzo kaj ŝerco* (171). — *Ŝako* (172). — *Reklamoj* (172—176).

La festita jubileo

Unu semajnon antaŭ la malfermo de nia XIXa Kongreso estis enskribiĝintaj ankoraŭ nur tricent partoprenantoj. Dum la restantaj ses tagoj la nombro atingis 923. Fakte pli ol mil esperantistoj ĉeestis nian grandan jubileon. Ni ĝoju pri tio, sed ni kompatu la organizantojn, kiuj devas labori sub tiaj kondiĉoj. Ĉu la esperantistaro ne povus plifaciligi la taskon de tiuj, kiuj preparas ion komune deciditan?

Gvidata de s-ro Aeltermann kaj helpata de s-ro Ĉe, la loka komitato aranĝis tre belajn tagojn. Eĉ la vetero favoris ĉion. Danzig ĉarmis la kongresanojn per siaj neforgeseblaj historiaj stratoj kaj pentrindaj domoj. Malnovaj pordoj, antikva muelilo, arta urbodomo allogis admirantojn. Antaŭ la stacidomo staris esperantista bonven-arkaĵo. Sub hela suno brilis la blua maro ĉe luksa homplena Zoppot, ĉe poeziaj Oliva, Glettkaŭ, Brösen.

Antaŭ la pinoj sur la sablo, renkontiĝis kaj en ondoj naĝis banemaj samideanoj el ĉiuj nacioj

Neniam antaŭe ĉeestis tiom da japanoj. Estis plezuro ilin bonvenigi. Ankaŭ la familio Zamenhof grandnombre partoprenis. La akceptoj ĉe Senato, Komisaro de Ligo de Nacioj kaj pola reprezentanto montris, ke nia movado nun ricevas oficialan atenton. Ankaŭ la Sovetlanda societo por eksteraj rilatoj delegis senditon [s-ron Drezen], kiu povis montri al kongresanoj la belan jubilean poŝtmarkon rusan kun portreto de Zamenhof. Al niaj forestantaj amikoj ni povis skribi sur poŝkartoj' de Danziga Libera Urbo kun esperanta oficiala teksto.

Apud Zoppot, ĉe rando de l' arbaro ni plantis la jubilean kverkon sur Placo de Esperanto kaj la urbestraro dediĉis belan monumenton al nia jubileo. Multaj samideanoj alportis teron el sia lando kaj reportis hejmen esperantajn diskojn de la granda filmgramofona firmo Tri-Ergon, kiu afable donacis po du al ĉiuj kongresanoj. Temo de elparolado kaŭzis interesan diskuton kaj montris la grandan unuecigan progreson depost la Unua Kongreso en Boulogne. La lingvo entute multe progresis dum tiu dudekjaro kaj la aŭdantoj fariĝis pli postulemaj al korekta elparolado.

La prelegoj de la Somera Universitato, kvankam alte teknikaj, allogis grandan aŭskultantaron kaj ĉiuj tre ŝatis saluti nian malnovan pioniron el Potsdam, la eminentan astronomiston Prof. D-ron Schmidt, kiu malfermis la kursojn. Ankaŭ tie la scienca nivelo kreskis.

Lasta laborkunsido kaj solena fermo de la kongreso okazis en Urbodomo de Varsovio, kie gesinjoroj Essigman ĉion preparis kun granda zorgemo kaj pacienco. Al la tombo de D-ro Zamenhof la diversnaciaj reprezentantoj alportis laŭvice florojn kaj salutojn kortuŝajn. De Aŭstralio ĝis el Sovetlando ĉiuj emocie alvenis por kliniĝi antaŭ la bela kaj impresa tombo skulptita de s-ro Lubelski. Koran dankon al la komitatoj por la monumento, la internacia, gvidata de s-roj Warden kaj Applebaum, kaj la Varsovia, prezidata de D-ro Robin.

Ĉie la urbestraro de Varsovio kaj la pola registaro sin reprezentigis. Eĉ la delegito de eksterlanda ministrejo tre flue parolis nian lingvon. Entute nia jubilea kongreso donis al ĉiuj venintoj multajn kaj belajn impresojn. La granda naskurbo de Esperanto kun sia unu miliona loĝantaro kaj siaj respektataj esperanto-pioniroj estis plej taŭga loko por solena fermo de nia jubilea festo. Sed multaj ankoraŭ pilgrimis al Bjalistok sub gvidado de s-ro Ŝapiro por vidi la domon en kiu naskiĝis nia Majstro mem.

Lia spirito inspiru nin en tiu nova epoko de nia movado kaj donu al ĝi flugilojn. Ĝis revido en Antverpeno 1928 kaj Budapest 1929!

Edmond Privat

XIX-a Universala Kongreso de Esperanto

Danzig, 28 Julio ĝis 4 Aŭgusto 1927

Solena malferma kunsido

la 29 Julio 1927 en „Schützenhaus" (Pafista Domo).

Precize je la 21 horo komenciĝas la kunsido. Aparta fest-iluminacio elektra heligas la impresan grandan salonon de l' Pafista Domo. Dum la eklumo de l' lampoj la orkestro de l' Orkestra Unuiĝo de Danzig, akompanite per fanfaroj, ludas „Quo vadis".

S-ino *Julia Isbrücker*, s'Gravenhage, ano de la Internacia Centra Komitato, deklaras la kongreson malfermita kaj en la nomo de I. C. K. kaj L. K. K. proponas la elekton de la sekvanta estraro:

Prezidanto: S-ro Bernh. Aeltermann, Danzig.
Vic-prezidantoj: S-ro Adam Zamenhof, Varsovio;
  S-ino Anna Tuschinski, Danzig;
  S-ro Prof. O. Bujwid, Krakow (Polujo);
  S-ro T. Guéritte, Paris (Francujo);
  S-ro Frans Schoofs, Antwerpen (Belgujo);
  S-ro Prof. W. Oishi, Tateno (Japanujo);
  S-ro J. M. Warden, Edinburgh (Skotlando).
Konstanta Generala Sekretario: S-ro Robert Kreuz, Genève.
Generala Sekretario: S-ro Andreo Che, Alba Julia (Rumanujo).
Sekretarioj: S-ro Kazimierz Majorkiewicz, Danzig;
  F-ino Käthe Marquardt, Danzig;
  S-ro Kurt Sachsze, Danzig.
Vic-sekretarioj: S-ro K. Mitschke;
  F-ino G. Slottke.

Per aklamo tiu ĉi propono estas akceptata.

Post transpreno de la prezidanteco S-ro *Bernh. Aeltermann* faras la sekvantan paroladon:

Estimataj gastoj,
Sinjorinoj kaj sinjoroj,

Estas granda honoro por mi, prezidi la jus malfermitan XIX-an Universalan Kongreson de Esperanto. Mi korege vin dankas pro la elekto kaj mi klopodas plej bone plenumi mian taskon.

Mi salutas vin plej kore kaj alvokas al vi koran bonvenon en nia malnova urbo Danzig!

Ne estas mia kutimo fari longajn paroladojn aŭ diri flatajn frazojn. Sed pri tri punktoj mi tamen devas paroli al vi.

La unua estas korega saluto.

Koran saluton al vi, altŝatata S-ro senatano D-ro Strunk, kiel oficiala reprezentanto de la Senato de l' Libera Urbo Danzig, saluton al vi, anoj de niaj registaro kaj parlamento, kiuj hodiaŭ bonvolas esti inter ni. Apartan saluton al la oficialaj reprezentantoj de l' diversaj ŝtatoj: S-ro ĉefkonsulo de Aŭstrio Gellhorn, S-ro Prof. D-ro Dietterle kaj ministeria konsilanto S-ro D-ro Ellerbeck de Germanlando, S-ro ĉefkonsulo Habert de Greklando, S-ro majoro Mangada-Rosenörn de Hispanujo, S-ro Isbrücker de Nederlando, S-ro legacia konsilanto v. Zalewski, Polujo, S-ro Schjerve de Norvegujo, S-ro Grafo van Randwijk, reprezentanto de la Alta Komisaro de l' Ligo de Nacioj, S-ro Chas. Tarelli de la Internacia Labor-Oficejo, S-ro Lindhagen, urbestro de Stockholm.

Estas vere granda honoro por mi, vin saluti speciale ĉi tie en nia plej ĉarma salono de Danzig.

Inter vi mi vidas la urbestron de Zoppot, S-ron D-ron Laue, kiu en granda favoro donis al nia kongreso unikan allogon la „Esperanto-Grundon", ĉarman parton en la bela arbaro de Zoppot.

Krom tio mi vidas tie ĉi grandan nombron da personoj el nia honora komitato. El profunda koro mi salutas kaj dankas vin. (Aplaŭdo.)

Estas tre multe da reprezentantoj de diversaj institucioj oficialaj, apenaŭ estas eble ilin nomi aparte.

Kaj nun, permesu, ke mi persone salutu vin, karegaj kongresanoj de l' tuta terglobo. Dum monatoj ni atendis vin. Ni preparadis la kongreson kun aparta amo por vi kaj tre ofte ni demandis nin, kiom da amikoj venos? Vidu, en la lastaj du semajnoj venis la plej granda nombro da aliĝoj kaj nun, post longa vojaĝo, vi sidas antaŭ ni.

Forgesu la malagrablajojn kaj malfacilaĵojn dumvojajn kaj restu ĝojaj inter ni, ne nur inter ni anoj de la internacia lingvo, sed ankaŭ inter la publiko de Danzig, kiu preparis la kongreson kune kun ni.

Mi ne preterlasas la okazon por saluti tutkore la anojn de la familio de nia kara majstro Zamenhof, kiuj per sia ĉeesto speciale honorigas la kongreson. (Aplaŭdo.)

Hodiaŭ ni festas la 40-an datrevenon de l' apero de nia kara lingvo Esperanto. Samtempe ĉi tie ni Danciganoj povas festi la 20-an datrevenon de l' fondiĝo de nia Danciga Esperanto-Asocio. Estas grandega ĝojo por mi saluti speciale S-inon Tuschinski, nian Esperanto-patrineton kaj la fondintinon de nia asocio. (Longa aplaŭdo.)

Ankaŭ la dua estas danko.

Dankon al la registaro de nia Libera Urbo kaj Ŝtato Danzig. Kun granda intereso ĝi rigardis nian laboron kaj preparadon por nia kongreso, kiun ĝi tiom favoris, ankaŭ finance. Ankaŭ dankon al la reprezentanto de la Pola Registaro, kiu helpis nin tre multe rilate la aranĝon de fervojo kaj pasporto. Fine mi ne forgesas esprimi la plej koran dankon al la gazetaro de Danzig, kiu tiom vivigis la intereson de l' publiko por nia afero.

Dankon fine al vi, karaj kongresanoj, pro via ĉeesto en nia kongreso. Ni faris nian eblon kaj ni kredas fine, ke ĉio marŝos bone.

La kronikisto pri nia kongreso havos specialan taskon: eternigi la impreson de l' Jubilea Kongreso. Nia afero marŝas, ĝi kreskas kaj donas kuraĝon por nia aktiveco. Tiel li ankaŭ devos enskribi koregan dankon al la laborantaro de nia Loka Kongresa Komitato, kiu tage kaj nokte laboris por sukcesigi nian kongreson. Personan dankon al vi, kara S-ro pastro Che, pro via gravega laboro en la antaŭ-preparado en Danzig. (Aplaŭdo.)

La tria punkto estas peto: hieraŭ mi jam anoncis, uzu nian komunan lingvon dum la daŭro de nia kongreso en nia urbo kaj la banlokoj. Mi vidas ĉi tie en la salonego diversajn gastojn en tre ĉarmaj kostumoj naciaj. Ili plenumas vere nian deziron, se ili portus tiujn kostumojn en la stratoj kaj stratetoj de nia malnova kaj preskaŭ internacia urbo, por ke nia Jubilea Kongreso donu vere internacian kaj universalan impreson al nia publiko, kies favoritoj vi estas.

Vivu la Deknaŭa! (Longa aplaŭdo.)

Post fino de la parolado fanfaroj eksonas kaj la orkestro ludas la himnon „La Espero", kiun la kongresanaro starante kantas.

Tuj poste S-ino *Herrnstadt-Oettingen* (Berlin-Nowawes) tre imprese kaj aplaŭdite deklamas la preĝon sub la verda standardo.

Nun S-ro Aeltermann donas la parolon al S-ro D-ro *Edm. Privat*, prezidanto de la Internacia Centra Komitato de la Esperanto-Movado en Ĝenevo, kiu faras jenan paroladon:

Tutkore mi salutas vin, esperantistoj kaj esperantistinoj el ĉiuj landoj, hodiaŭ kunvenintaj por festi en Danzig la kvardekan jubileon de nia lingvo kaj de la potenca nova sento, kiun ĝi disportas tra la tuta mondo.

Ke vivas Esperanto, ke miloj kaj miloj da homoj ĝin parolas, ĝin skribas, ĝin amas en ĉiuj regnoj de la mondo, trans ĉiuj landlimoj, ke riĉa bela lingvo elkreskis el la genia semajo de D-ro Zamenhof antaŭ kvardek jaroj, tio estas unu el la plej mirindaj venkoj de l' homa spirito, ĉiam avida transflugi super baroj materiaj aŭ intelektaj por ekvidi, kiel infanoj jam emas, kio estas ĉe l' alia flanko de l' muro.

La batalo por Esperanto estas unu el la nunaj grandaj bataloj por justeco. Tra la tuta homa historio la homoj kaj la popoloj batalis por justeco. Sur la kampo nacia, sur la kampo socia, sur la kampo ekonomia, ĉie oni batalis kaj batalas kaj batalos ankoraŭ por atingi pli da justeco, pli da egaleco inter individuoj kaj inter nacioj. Ankaŭ sur la kampo lingva la justeco mankas kaj la esperantistoj batalas por ĝi.

En la nuna epoko, kiam la tuta mondo estas devigata pensi pli kaj pli internacie, ĉar la nacioj spertis, kiom ili dependas unuj de la aliaj en la hodiaŭa periodo, kiam la tuta homaro klopodas sin organizi kolektive en multaj aferoj, en ĉi tiuj tagoj de internacia konstruado kaj kunlaborado, regas ankoraŭ grandaj malegalaĵoj inter la potencaj kaj malgrandaj nacioj, eĉ inter la okcidentaj kaj orientaj popoloj, ofte multe pli vastaj, sed malpli fortaj laŭ materia vidpunkto.

XIX Universala Kongreso
de Esperanto
III. Internacia Somera Universitato 28. Julio-4. Aŭgusto 1927
CIGARREN
1

Boncena arko ĉe stacidomo en Danzig

Unu el tiuj malegalaĵoj estas la lingva sistemo. Ni esperantistoj solene proklamas, ke ĉiuj nacioj havas la nepran rajton je sia lingvo kaj kulturo kaj ke neniu rajtas trudi la sian al ceteraj kontraŭ ilia volo. Sed tiu rajto de la gepatra lingvo apartenas, ne nur al la grandaj, sed al ĉiuj eĉ plej malgrandaj popoloj en la mondo.

Bone kaj bele respondas la realistoj, sed kiel vi povas aranĝi la internaciajn komunikojn? Ĝis nun internaciaj rilatoj okazas per lingvoj de grandaj nacioj, kiujn la malgrandaj devas balbuti.

La ceteraj landoj meritas esti tute alie traktataj. Ili meritas situacion, kiu metu ĉiujn sur saman etaĝon. Tion ebligas Esperanto. Ĉiuj lernu ĝin kaj ĉiu sentos sin egale hejme kun ĉiuj ceteraj. Regos tiam ne la potenco de l' devena lando, sed la nura talento kaj kompetenteco.

Simila maljustaĵo kaj malegaleco lingva ekzistas inter klasoj. Ĝis nun tre malgranda malplimulto da homoj, diplomatoj aŭ intelektuloj, kvazaŭ monopolis la internaciajn rilatojn, ĉar ili povis lerni kelkajn fremdajn lingvojn en eksterlandaj universitatoj. Sed la grandaj amasoj de la popolo, sur kies ŝultroj pezas la ĉiutaga laborado de pactempo kaj la vivoferoj de la milito, tiuj grandaj amasoj ne povis ricevi tiun luksan aldonon al sia elementa kulturo. Tial ili restas for de la rektaj rilatoj kun aliaj popoloj. Ĉu tio estas justa?

Ne, ili rajte plendas pri tiu malegalaĵo. Ili ekmalfidas tiujn, kiuj monopolas la internacian rilataron kaj tiel longe sidas en kongresoj kaj konferencoj sen iaj rezultatoj por senarmigo kaj malŝarĝo de la popoloj. Ili volas havi sian partoprenon kaj kontrolon en la internacia vivo. Tute prave. Tion povas ebligi nur komuna lerno kaj uzo de facila mondlingvo kiel Esperanto.

Tion sentis profunde D-ro Zamenhof, kiu deziris el tuta koro la amon inter popoloj. Li sciis, ke malfacila estas amo sen justeco. Lia lingvo ebligas unue la justecon en la rilatoj inter nacioj kaj ĝia spirito alportas la amon. La tuta verkaro de nia Majstro, la ĉefa literaturo en nia lingvo kantas pri homaro pli komprenema, pli tolerema, pli harmonia.

Antaŭ kelkaj monatoj, dum la belga esperantista kongreso en Mons, subite eksonis el alta preĝeja turo la bela melodia muzikado de l' sonorilaro. La tuta kongreso svarmis en la korto de l' urbodomo kaj sur la placo de l' centro.

Jen sonis tra l' silento malnovaj popolaj kantoj de niaj diversaj nacioj. Ili memorigis nin pri nia hejmlando, niaj urboj, niaj vilaĝoj, niaj kampoj, la belaj tagoj de l' infaneco, ankaŭ pri teruraj luktoj kaj bataloj. Kaj jen subite eksonis la melodio de la himno „La Espero": En la mondon venis nova sento, tra la mondo iras forta voko . . .

Jes, sur flugiloj de facila vento ĝi flugis super ni en la aero, super tiu malnova urbo, kie tondris pafiloj kaj kanonoj antaŭ apenaŭ dek jaroj. Ĝi flugis, ĝi kantis pri l' espero de l' homaro, pri novaj pli feliĉaj tempoj, pri granda rondo familia.

Iam ĝi sonoros tiel el ĉiuj turoj. Iam ĝi estos kantata de ĉiuj infanoj en lernejoj, se ni brave, pacience laboras kaj disvastigas en la mondo ne nur la parolon, sed ankaŭ la spiriton de l'komprenemo.

La Internacia Komitato de la Ruĝa Kruco, kiu ĉiujare sin reprezentigas en niaj kongresoj, de post sia favora decido pri Esperanto petis min, alporti al tiu ĉi jubilea kongreso sian koran saluton kaj bondeziron kun la esprimo de bedaŭro pri la morto de nia fervora samideano Rud. Horner. (La kongresanoj leviĝas.)

Gia devizo estas „inter arma caritas". Gi deziras, ke la interna ideo, kiu gvidas la esperantistojn, disvastiĝu pli kaj pli inter ĉiuj homoj. Vera esperantisto ne rajtas esti blinda ŝafo malantaŭ nacia muro. Car li posedas la komprenan trezoron, li ĝin uzu por havi pli homan, pli altan, pli simpatian komprenon pri la bezonoj, pri la vidpunkto, pri la malfacilaĵoj de l' aliaj nacioj. Li memoru la grandan ekzemplon de nia Majstro, ĉiam larĝanima, malegoista kaj modesta, ne nur individue, sed ankaŭ nacie.

Nun ni staras ĉe la komuna fajro de nia granda esperantista tendaro. Ciuj el vi alportu siajn zorgojn, siajn sopirojn, siajn internajn malbonajn herbaĉojn aŭ siajn sekajn branĉojn kaj jetu ilin en la fajron. Ni premu kore niajn manojn, ni formu la rondon ĉirkaŭ la bela flamo. Gi kresku, ĝi kraku, ĝi varmigu niajn korojn. Ekstere la mondo noktas ankoraŭ. Malfermu la pordon, ke ĝi vidu la lumon, vidu kiel homoj el ĉiuj landoj kapablas interkompreniĝi kaj fratiĝi. Ni kulturu tiun lumon, reveninte hejmen kaj ĝin disradiigu ĉirkaŭ ni. Vivu Esperanto, vivu la spirito Zamenhofa! (Tondra aplaŭdo.)

(Laŭ stenografaĵo de Robert Kreuz — Stolze-Schrey.)

Sekvas post tio salutparolado de S-ro D-ro *Strunk*, senatano por scienco, arto kaj popolklerigo, kiel oficiala reprezentanto de la Libera Urbo Danzig. Li diras la jenon:

Altestiminda festkunvenantaro,

La Senato de l' Libera Urbo Danzig akceptos morgaŭ vespere en la antikva, mondfama kaj impona salono de nia historia „Artushof" la reprezentantojn de la XIX-a Universala Kongreso de Esperanto kaj salutos ilin pere de l' prezidanto de nia senato.

Mi mem, kiel reprezentanto de l' ŝtata registaro de la Urbo Danzig en via unua oficiala kunsido do povas kvazaŭ transdoni al vi nur la ŝlosilojn por la pordegoj de l' muroj, kiuj ĉirkaŭas nian urbon, por ke vi povu senĝene kaj bonhumore eniri ĝin kaj ĝui nian protekton kaj zorgon. La senato kaj mi, kiel senatano por scienco, kulturo kaj popolklerigo, sekvas al la klopodado de la Esperanto-movado kun la granda atento kaj la intereso, kiun meritas havi de la aŭtoritatoj, ĉiu serioza spirita movado. Mi persone povas klarigi al mi la entuziasmon, kiu travibras vian arangon kaj la propagandoforton kaj la ekspansion de l' Esperanto per nenio alia, ol ke motivoj de altaj moralo kaj kulturo estas la puŝoforto de via movado. (Brave!)

Mi devas konfesi, ke en antaŭa tempo mi havis certan antaŭjuĝon kontraŭ Esperanto, kiu ĉefe bazis sur la speciala situacio, en kiu troviĝas nia Libera Urbo Danzig. Mi timis, ke la disvastiĝo de la Esperanto-lingvo povus eventuale malutili al nia germana gepatra lingvo, kiu estas sankta al ni kaj kiu per la konstitucio de Danzig estas nia oficiala kaj ŝtata lingvo. En 1922, kiam tie ĉi okazis regiona kongreso de Esperanto, mi studis la programon de l' Esperantismo kaj trovis, ke mia timo estas senbaza. (Aplaŭdo.) Tion jam deklaris sinjoro via prezidanto, ke per Esperanto la naciaj lingvoj estu neniel forpuŝataj, sed ke Esperanto nur celas esti monda helplingvo apud la nacilingvoj. (Aplaŭdo.) Inter la celoj, kiujn fiksis al si la Esperanto-movado, troviĝas unu tre alta, kies atingo havas plej altan signifon por la tuta homaro. Tiu ĉi celo estas, atingi plenan komprenon inter ĉiuj popoloj. Kaj la Esperanto-movado esperas kaj kredas pri tio, ke la interkompreniĝo pere de komuna mondhelplingvo kunhelpos al tio, egaligi la naciajn kontrastojn kaj kontraŭstarojn. Mi kredas, ke tiu ĉi celo de la esperantistoj devas trovi la konsenton de ĉiu serioza homo. (Brave!) Per tio oni neniel difektas la naciajn kulturojn — kaj tio laŭ la vidpunkto de l' esperantistoj ja ankaŭ estus erara — ĉar ĉiu homa okazaĵo esprimiĝas en plej diversaj popolecoj kaj ĉar estus domaĝo por la homaro, se iu ajn popoleco pereus.

Tiel mi hodiaŭ vespere salutas vin tre kore per la alvoko: Esperantistoj el ĉiuj landoj, estu kore bonvenantaj en Danzig! (Granda aplaŭdo.)

(Laŭ germana stenografaĵo tradukita en Esperanton.)

XIX Universala Kongreso de Esperanto

La stacidomo en Danzig

La prezidanto en la nomo de l' kongreso dankas kore al la parolinto kaj donas la parolon unue al la delegito de l' Alta Komisaro de la Ligo de Nacioj en Danzig, S-ro Grafo van Randwijk, kaj due al la reprezentanto de la Komisaro de la Pola Respubliko, S-ro legacia konsilanto de Zalewski.

La unua parolas germane, la dua pole. S-ro Essigman tradukas la paroladon en Esperanton.

Ambaŭ tre kore salutas la kongreson kaj elmontras la grandan intereson, kiun ambaŭ iliaj nacioj havas por Esperanto, antaŭ ĉio rekonante la paralelecon en la komuna celo: servi al la internacia kompreno kaj la solidareco de l' popoloj.

Sekvas la alparoloj de la oficialaj delegitoj de l' ŝtatoj, kiuj reprezentigis sin en la Deknaŭa:

Aŭstrio: S-ro Ĉefkonsulo Gellhorn, Danzig;
Germanujo: Prof. D-ro J. Dietterle, Leipzig (por la Respublika Registaro);
Ministeria konsilanto D-ro Ellerbeck (Trafika Ministerio);
Greklando: S-ro Ĉefkonsulo Habert (pro malsano retenita dum vojaĝo);
Hispanujo: Majoro Mangada-Rosenörn, Madrid;
Nederlando: S-ro Isbrücker, s'Gravenhage;
Norvegujo: S-ro Schjerve, Oslo.

Plue estis reprezentitaj la

Internacia Labor-Oficejo, Ĝenevo: S-ro Tarelli;
Urbo Stockholm: S-ro ĉefurbestro C. Lindhagen.

S-ro *Lindhagen* faras la sekvantan alparolon en Esperanto, komencante per germana frazo, dirante: Bedaŭrinde mi ankoraŭ ne scias Esperanton, sed mi tamen parolas ĝin:

Sinjoroj kaj sinjorinoj,

La Komitato de la Kongreso havis la afablecon, inviti min al ĉi tiu kunveno. Laŭ mia supozo pro tio, ke mi depost 1911 klopodis igi inter alie la parlamentanaron ne sole en la sveda „Riksdag", sed ankaŭ en la Interparlamenta Unio, enmeti sur sian programon la demandon mondlingvan. Tio koncernas ja nenion malpli multan ol la antikvan mizeron de la lingvolimoj kaj ebligi la interfratiĝon spiritan inter la popoloj. Jen do demando kun fundamenta signifo por la ekekzisto de nova mondo.

La eminentuloj de Eŭropo de ĉiuj partioj estas tamen tute okupitaj de sia hodiaŭa politiko kaj de sia batalo pri la potenco. Ili ne povas interesiĝi pri io, kio volas penetri al la fundo de la aferoj.

Same kiel ĉiuj grandaj reformoj, ankaŭ ĉi tiu devas veni de el malsupre, el la instinkto de memsavo de l' popoloj. Krom tio ŝajnas, ke de l' Oriento, de Azio, fine venos tiu granda liberigo, ankaŭ por la Okcidento.

La predikado ankaŭ estas ago kaj la ekkomenco de la solvoj. Mi tial volus proponi, ke ĉi tiu kongreso decidu dezir-esprimon al ĉiuj registaroj kaj parlamentoj, agadi por la altigo de Esperanto por esti, per internacia kontrakto, la mondlingvo.

Miaparte mi volas esprimi mian grandan dankemon, ke mi havis okazon partopreni kiel observanto ĉi tiun plenvivan demonstracion pri forigo de klaslimoj kaj pri interfratiĝo de la spiritoj per la apero de mondlingvo. (Multa aplaŭdo.)

Al tiu ĉi alparolo sekvas salutvortoj de S-ro *Leono Zamenhof*, frato de nia mortinta Majstro, kiu pentras alegorion pri la ekkomenco kaj la pasinteco de Esperanto, la malfacilaĵoj, kiujn renkontis kaj parte ankoraŭ renkontas Esperanto. Sed li konstatas la pliiĝantan internaciiĝon de nia tempo kaj en ĝi vidas larĝan bazon por nia estonto. Ni devas zorgi, ke Esperanto estu lingvo de la vivo.

Granda aplaŭdo sekvas tiun elkoran alparolon kun emocia voĉo.

Post tio sekvas la alparoloj de sekvantaj organizacioj:

Asocio por internaciaj intelektaj rilatoj de Sovet-Ruslando: S-ro E. Drezen;
Internacia Bahai-Movado: F-ino Root;
Paneŭropa Unio: S-ro Klein.

S-ro *E. Drezen* en la nomo de la Societo por Kulturaj Rilatoj inter USSR kaj eksterlando salutas la kongreson, komunikas pri la intereso, kiun havas por Esperanto vastaj soci-rondoj de Sovetlando, kaj li sciigas, ke la Soveta Akademio de Sciencoj intencas esplori la problemon pri la movado mondlingva. Li finas sian alparolon, konstatante, ke la Soveta Registaro esprimis sian rilaton al la Esperanto-movado, aperiginte specialajn jubileo-poŝtmarkojn kun portreto de Zamenhof. Estas nur la kvara viro tiamaniere honorigita en la Sovetlandaro. La unuaj estis Lenin, sciencisto Lomonosov kaj la eltrovinto de radio, Popov. La kvara estis Zamenhof, la aŭtoro de Esperanto.

F-ino *Root* legas leteron de S-ro Shoghi, la nuna estro de l' Bahai-movado en Haifa (Palestino), kiu bondeziras la kongreson kaj niajn laborojn.

S-ro *Klein* transdonas la salutojn de la Paneŭropa Unio, substrekante, ke grandparte la celo de ambaŭ movadoj koincidas.

Jenaj organizacioj estis oficiale reprezentitaj en la kongreso:

Asocio por Internaciaj Intelektaj Rilatoj de Sovet-Ruslando, Moskva;
Asocio Internacia por la protekto de l' infano, Genève;
Bahai-Oficejo Internacia, Genève;
Cionista Organizacio, London;
Frankfurta Internacia Foiro, Frankfurt a. M.;
Fervojo Bern—Lötschberg—Simplono, Bern;
Germana Monista Ligo, Berlin;
Internacia Komitato de l' Ruĝa Kruco, Genève;
Internacia Bontemplana Ordeno, Stockholm;
Internacionalo de Kontraŭmilitistoj, Enfield, Middles;
Foira kaj Ekspozicia Oficejo, Berlin;
Komerca Ĉambro, Budapest;
Komerca Ĉambro, Miskolcz;
Komerca Ĉambro, Stuttgart;
Germana Unio de Teknikaj-sciencaj Asocioj, Berlin;
Konfederacio Internacia de l' Studentoj, Bruxelles;
Monda Alianco por Progresigo de Internacia Amikeco inter la Eklezioj, London;
Gazetara ekspozicio „Pressa", Köln;
Paneŭropa Unio, Wien;
„Por la Nova Epoko", Genève;
Revuo de l' Universo, Paris.

Bondezirojn sendis okaze de l' jubileo:

Belga Federacio de Gimnastiko, Bruxelles;
Ĉambro de Komerco kaj Navigacio, Barcelona;
Foiro de Paris;
Germana Radio-Unio (Reichsrundfunk), Berlin;
Gremio de l' Viena Komercistaro, Wien;
Ĝenerala Superintendento de l' Libera Urbo Danzig.
Hamburg—Amerika-Linie, Hamburg;
Internacia Federacio de Transport-Laboristoj, Amsterdam;
Internacia Foiro de Lyon;
Instituto por Monda Ekonomio kaj Martrafiko, Kiel;
Internacia Federacio de l' Oficistaro, Amsterdam;
Internacionalo de l' PTT-Oficistaro, Wien;
Industria kaj Komerca Ĉambro de Köln;
Internacia Laborista Sindikato, Amsterdam;
Internacia Kongreso de l' Eldonistoj, Bern;
Internacia Asocio de Aera Trafiko, 's Gravenhage;
Internacia Asocio por la Socia Progreso, Paris;
Komerca kaj Metia Ĉambro de Cheb (Eger);
Komitato de l' Ruĝa Kruco, Paris;
„Ravag", Aŭstria Societo por Radio-Komunikado, Wien;
Turisma Oficejo, Luxembourg;
Universala Komitato de la Kristanaj Asocioj de Junaj Viroj (YMCA), Genéve;
Unueca Sindikato de l' Germanaj Fervojistoj, Berlin.

S-ro *Kreuz* laŭtlegas telegramon de l' pola ministro en Genève, S-ro Sokal, kiu bondeziras la kongreson pri bona sukceso.

Sekvas la salutparolantoj de diversaj landoj kaj asocioj esperantistaj ktp.

Listo de l'parolintoj:

Alĝerio: S-ro Couffinhal;
Aŭstralio: S-ro Pyke;
Aŭstrio: S-ro Steiner;
Aŭstrio: S-ro D-ro Kempeneers;
Britujo: S-ro Robertson;
Bulgarujo: S-ro Tričkov;
Ĉeĥoslovakio: S-ro Neuzil por Ĉ. A. E.,
S-ro Krysta por Germana Ligo en Ĉeĥoslovakio;
Danujo: F-ino Melchior;
Dancigo: S-ino Tuschinski;
Estonio: F-ino H. Dresen;
Finlando: S-ro V. Setälä;
Francujo: S-ro Guéritte;
Germanujo: S-ro D-ro Kliemke;
Greklando: S-ro B. Aeltermann;
Hebreoj: S-ro Lejzerovič;
Hispanujo: S-ro Pino;
Hungarujo: S-ro P. Tolnai;
Irlando: F-ino E. Osmond;
Italujo: S-ro Orengo;
Japanujo: S-ro Hasegaŭa;
Latvio: F-ino Pirkst;
Litovio: S-ro Klimas;
Nederlando: S-ino Isbrücker;
Norvegujo: S-ro H. Bonnevie;
Polujo: S-ro Prof. Bujwid;
Rumanujo: S-ro Andreo Che;
Sudslavio: S-ro Friedländer;
Svedujo: S-ro P. Nylén;
Skotlando: S-ro Warden;
Svislando: S-ro D-ro Spielmann;
Usono: S-ro Hamann.

Post fino de la salutparoladoj la orkestro vigle ludas la kanton de l'Ligo: „Fratoj, manon donu kore". La kongresanaro en granda entuziasmo starante kunkantas ĉiujn strofojn.

Poste la prezidanto deklaras finita la kunsidon kun multa danko al la ĉeestintoj.

Fino de l'kunsido je 23,30 h.

* * *

1-a Labora Kunsido

la 30 Julio en la Teknika Altlernejo.

Komenciĝo: 11,10 h. Prezidas: D-ro Privat, prez. de I. C. K.

D-ro *Privat* sciigas pri ĵus ricevita informo, ke subite mortis la vicprezidanto de Germana Esperanto-Asocio, S-ro Direktoro Gube. Li petas la kunsidon leviĝi honore al la kara mortinto, malnova pioniro de nia afero en Germanujo.

Post tio S-ro ministeria konsilanto D-ro *Ellerbeck*, Berlin, salutas en la nomo de l'Germana Ministerio de Trafiko, kiun li prezentas en la kongreso. Li sciigas pri la granda intereso, kiun alportas al nia klopodado la trafika ministro S-ro Koch kaj kiom grava estas Esperanto por la internacia komunikado. Ne estas tasko de l'ministerio propagandi ideon; ĝin kondukas nur praktikaj konsideroj, sed la ministerio plene konscias pri la graveco de Esperanto en la interkomunikado kaj ĉefe en aervetura trafiko kaj atente sekvas ĝian evoluon.

En la nomo de l'ministerio kaj de l'ministro persone li transdonas plej korajn salutojn kaj dezirojn pri bona sukceso.

S-ro *Balkanyi*, Budapest, salutas en la nomo de Princo D-ro Josefo Francisko, prezidanto de la societo „Banurbo Budapest" kaj invitas la kongreson por 1929 al Budapest. Samtempe li transdonas la salutojn kaj bondezirojn de la Industria kaj Komerca Ĉambro de Budapest kaj de la Hungara Radio-Revuo „Radio Magyar Ujsag".

S-ro Prof. D-ro *Dietterle* tiam raportas pri la enketoj sciencaj koncerne instruadon de Esperanto de Prof. Bovet, Direktoro de la Internacia Eduka Oficejo. Tiuj enketoj faritaj pere de „testoj" donis treege interesajn rezultatojn. La unuaj testoj kunmetitaj ne sufiĉis por fari la necesan konstaton. La Eksperimenta Komisiono (Prof. D-ro Bovet, F-ino Alexandra Fisher, Bishop Auckland, D-ro Kamaryt, Bratislava, D-ro Möbusz, Lübeck, rektoro Jansson, Stockholm) do uzis korektitajn formulojn laŭ bezono eŭropa. Krom tio la komisiono interrilatis skribe kun instruantoj de Esperanto diversnaciaj, ricevinte respondon el 16 landoj. 29 lernolibroj de 28 nacioj estas studitaj. Plue oni esploris la „Fundamenton", uzatan en multaj regionoj. La celo estis, sciiĝi, ĉu la vortoj uzataj en lernolibroj de elementaj kursoj estas la samaj en la diversaj landoj, ĉu ili same estas gradigitaj ktp., ĉar la rezulto devas liveri la vortojn uzotajn por la definitivaj „testoj".

En detala raporto, kies publikigo estas intencita, ĉiuj rezultoj estas priskribitaj.

S-ino *Morris*, New-York, poste raportas pri la ampleksa laboro de „IALA", kiu faris tre interesan konstaton pri Esperanto. Ĝi elmontras la necesecon havi bonan kaj fidindan statistikon pri la Esperanto-movado, kiun „IALA" povus uzi kun multa utilo al nia afero.

Prof. D-ro *Dietterle* resume raportas pri la Tutmonda Statistiko, komencita laŭ decido de la Konferenco de Locarno. Bedaŭrinde ĝi ne povis esti finfarita pro tio, ke multaj esperantistoj, grupoj ktp. absolute ne respondis. Li plendegas, ke tio malhelpas bonan kaj zorgeman laboron, kaj li petegas, ke la esperantistoj montru pli da disciplino. Alie la statistiko malsukcesos kaj donos malĝustan impreson pri nia forto. Jam nun li povas konstati per kontroleblaj detaloj, ke la ciferoj tute ne respegulas la grandegan amplekson de nia movado.

Post la kongreso li denove faros alvokon por trovi la finan helpon nepre necesan por finigi la tuton.

S-ro lernejestro *W. Hahn*, Gohlis-Dresden, donas detalan superrigardon pri la laboro de la „Tutmonda Lerneja Servo" kaj ĉefe pri la infan-interkorespondado. En Saksujo en 68 urboj kaj vilaĝoj Esperanto estas instruata, parte kiel laŭvola, parte kiel deviga fako. S-ro Hahn instruas Esperanton depost 18 jaroj kaj ĉefe atentis pri la infan-korespondo. Liaj lernantoj konas du specojn de internacia korespondado: la unua estas leter-interŝanĝo kun infanoj de alilandaj Esperanto-klasoj, la dua estas interŝanĝo de leteroj kun instruistoj en aliaj landoj. La rezultato de ambaŭspeca korespondado estas treege observinda. La infanoj ekkonas pere de la rekta interrilatado, ke ankaŭ en aliaj landoj vivas homoj, kiuj havas saman penson, saman fervoron, saman idealon, samajn zorgojn, samajn doloron kaj ĝojon, kaj ke nur la ne-interkomprenebleco ilin malhelpas konatiĝi reciproke. Centoj da leteroj el ĉiuj landoj de la mondo tion montras evidente. Montriĝas ankaŭ, ke la infanoj de plej frua juneco inklinas pri porpaca ideo kaj ke la korespondado estas vere boninflua al ĝenerala klerigo pri fremdlando ktp. Kompreneble la korespondado ankaŭ ne restis sen influo al la gepatroj de la koncernaj infanoj, kies intereso pri la problemoj, observataj de l'infanoj, estis fruktodone vekita.

S-ro Hahn rekomendas tiun ĉi aplikadon de Esperanto al ĉiuj instruistoj kaj pacamikoj de l'tuta mondo.

Li poste klarigas la celon de Tutmonda Lerneja Servo. Ĝi unue celas la aranĝon de internacia infan-korespondado, jus priskribita. La dua tasko estas internacia interŝanĝo de bonaj instruiloj kaj bildoj. La tria tasko estas la interŝanĝo de diversnacia esperantista infanaro por libertempa restado.

Je fino li alvokas la esperantistajn ĉeforganizojn, ke ili favoru kaj protektu la novan institucion, kiu en sia komenca stato komprenebla devas ankoraŭ venki multajn, ĉefe financajn malhelpojn.

S-ro lerneja direktoro *Neuzil*, Olomouc (Ĉeĥoslovakio), informas pri la rezultato, atingita de li. Li instruas Esperanton de post 1919 en sia 2-klasa elementa lernejo kun simila konstato, kiel S-ro Hahn. Li havis aparte konsiderindan sukceson en la interrilatoj de sia infanaro kun anglaj infanoj. Anglaj instruistinoj de l' koncernaj infanoj vizitis lian lernejon kaj kontaktis kun la tre interesitaj gepatroj. La skoltoj en Olomouc preparas jenan laŭplanan laboron por la venontjara libertempo. Ili intencas lerni Esperanton, korespondi kaj interŝanĝi kun fremdlandaj skoltoj, fari albumojn, aranĝi Esperanto-feston kaj, se eble, en Julio 1928 14-tagan internacian Esperanto-tendaron. Li alvokas jam nun la gesamideanojn, helpi al tiu ĉi klopodado.

La kunsido poste akceptas unuanime la jenan dezir-esprimon:

> „La Internacia Centra Komitato korespondu kun sinjoro W. Hahn, Gohlis-Dresden, rilate la diskonigon de la ‚Tutmonda Lerneja Servo' kaj donu al li ĉiun eblan helpon por sukcesigi tiun valoran institucion."

D-ro *Privat* dankas al la raportintoj pro ilia bonega kaj vere utila laboro kaj siaparte promesas al ĉiuj plej eblan helpon.

En konekto kun tiu ĉu temo li sciigas, ke li jam havas la ideon pri aranĝo de Teknika Konferenco, kiu iamaniere povus havi rilaton al tiu ĉi kampo. Li esperas, ke post 1½ jaroj en 1929 povos okazi konferenco kun proksimume la sekvanta temo: Protekto al infanoj laŭ jura kaj higiena vidpunktoj. Li atentigas pri la grandioza laboro, kiun en tiu ĉi kampo faris F-ino Buxton, London, al kiu li poste donas la parolon por resuma raporto.

F-ino *Buxton*, London, informas pri ŝia kontakto kun la movado por savo de infanoj, en kiu ŝi agadas de post 8 jaroj. Ĝi substrekas la necesecon, ke la infanoj de ĉiuj landoj devas interkonatiĝi persone kaj ĝi vidas bonegan eblecon en tio pere de Esperanto. La Ligo por savi infanojn laboras en 30 landoj kaj havas multajn kontakt-punktojn kun la Esperanto-movado. Ŝi estas tre preta kunlabori kaj ŝi vidas klare la necesecon de konstanta interrilataro inter ambaŭ movadoj.

D-ro *Privat*, dankante ankaŭ al ŝi pro la interesa raporto, proponas, transdoni la dankon kaj bondeziron pro tiu porhomara laboro al la estrino de la Ligo por Savo de Infanoj, F-ino Jebb. Akceptite.

S-ro urbestro *Lindhagen* submetigas la sekvantan deziresprimon:

> „La Kongreso deziresprimas, ke I. C. K. daŭre klopodu atingi per parlamentoj kaj registaroj interŝtatan konvencion pri oficialigo kaj instruado de Esperanto kiel helpa mondlingvo."

La kongreso unuanime akceptas la dezir-esprimon.

Fino de l' kunsido je 13,10 h.

* * *

Publika Kunsido de I. C. K. kun K. R. kaj UEA
la 1 Aŭgusto 1927 en la Parlamenta Domo (Volkstag)

Komenciĝo je 2,45 h. Prezidas: D-ro Privat, prez. de I. C. K.

La delegitoj sidas laŭ parlamenta ordo. Sur la podio en la mezo I. C. K., maldekstre la reprezentantoj de UEA, dekstre la K. R.-anoj. La kunsidejon kaj la galerion plenigas la kongresanoj.

Generala temo: Venontaj kongresoj.

Post enkondukaj paroloj de D-ro Privat S-ro *Glück*-Berlin salutas en la nomo de la Foira Oficejo de Berlin kaj invitas en ĝia nomo al Internacia Kongreso en 1930.

D-ro Privat dankas pro la sciigo kaj petas esprimi dankon al la Oficejo. Li atentigas pri la regulo, ke invito al universala kongreso por iu urbo estas nur akceptata de I. C. K., se la koncerna nacia societo konsentas pri tio. I. C. K. poste ekzamenos la aferon.

Prof. *Bujwid* invitas nome de Pollanda Esperanto-Delegitaro por 1929 al Poznan, kie prezentiĝas bonega okazo.

S-ro *Mangada* ripetas inviton al Madrid por iu jaro, sed petas, ke kunsido tamen difinu la koncernan jaron en la tempo inter 1929-31.

D-ro *Kliemke*-Berlin sciigas pri invito de la urbo Braunschweig por 1930, sed rezervas al G. E. A. ankoraŭ doni sian opinion al I. C. K.

D-ro Privat informas samtempe, ke venis oficiala invito al Milwaukee (Usono) kaj malfermas la diskuton pri la temo.

Oni pritraktas unue la kongreson en 1929, por kiu unuavice Budapest estas proponita.

S-ro *Steiner*-Wien pledas nepre por Budapest. El tiu aranĝo ankaŭ povus treege profiti la nun vigla movado en Aŭstrio.

Ankaŭ S-ro *Orengo* esprimas la preferon de italaj samideanoj por Budapest.

S-ro *Dreher*, P. E. D., pledas por kongreso en Polujo. Se aranĝo en Budapest estos nepre necesa, oni zorgu pri teknika konferenco en Poznan.

D-ro *Privat* demandas, ĉu la kongreso estas ligita al certa jaro.

Prof. *Bujwid* tion jesas por 1929.

S-ro *Behrendt* petas atenti pri la geografia situacio de kongresoj kaj teknikaj konferencoj kaj proponas lasi al I. C. K. definitivan decidon.

S-ro *Balkanyi* vigle invitante al Budapest, atentigas, ke ni perdos la ŝancon minimume por 5 jaroj, se la kongreso en 1929 ne okazos en Budapest. La kongreso estas nepre ligita al la jaro 1929, ĉar tiam okazos Mondekspozicio kaj diversaj gravegaj aranĝoj. La urbo Budapest kaj la Societo „Banurbo Budapest" ja oficiale invitis.

Prof. *Bujwid* akcentas, ke jam en Edinburgh li invitis al Varsovio por 1929, sed ke I. C. K. ne decidis pri tio.

S-ro *Kreuz* klarige respondas, ke la invito estis notita. I. C. K. bonorde sin turnis skribe dufoje al la polaj samideanoj por ricevi oficialan inviton, kiu ne okazis.

S-ro *Dreher* proponas aranĝon de ekspozicio de esp. libroj en la granda ekspozicio de Poznan en 1929, unu semajnon post la kongreso en Budapest, se ĝi nepre devas okazi tie.

S-ro *Essigman* diras, ke teknika konferenco ne montras utilon al polaj samideanoj. Ili nepre deziras universalan kongreson.

S-ro *Pino* por Hispana Esp.-Asocio deklaras, ke la hispanaj samideanoj estas eventuale pretaj rezigni, se la neceseco tion postulas.

S-ro *Mangada* preferas persone Polujon, sed se necese, ankaŭ li balotas por Budapest.

S-ro *Triĉkov* en la nomo de bulgaroj pledas por Budapest.

Kun la nuna numero estas sendataj:
Bulteno de la Internacia Labora Oficejo N-ro 23
Gvidfolio tra itala urbo Padova.
Reklamilo de Belga Esperanto-Instituto

*

Al la Delegitoj de UEA:
Oficiala Bulteno N-ro 20 kun aldonoj.

S-ro *Aeltermann* por la Esp.-Asocio de Danzig aliĝas al tio. Ĉar nia kampo estas la Balkano, neniu alia loko taŭgos pli.

Ankaŭ S-ro *Isbrücker* por L. E. E. N. subtenas tiun ĉi propo...

S-ro *Buxton* por B. E. A. esprimas konsenton pri ĉiu decido, ĉar por britaj samideanoj la distancoj estas egale grandaj.

S-ro *Agourtine* subtenas la proponon pri Poznan, dume S-ro Schoofs en nomo de B. L. E. pledas por Budapest.

Voĉdono montras, ke la plimulto de la reprezentitaj asocioj balotas por Budapest. Du asocioj sin detenas, du donas voĉon por Poznan.

D-ro *Privat* konstatas, ke laŭ tio I. C. K. estos devigata akcepti la inviton por Budapest en 1929. Li demandas al la polaj samideanoj, ĉu iamaniere estos eble fari aranĝon por 1930, aŭ se necese malgrandan por 1929, kiel proponite por Poznan.

Prof. *Bujwid* informas, ke li havas rajtigon nur por akcepti inviton por 1929.

S-ro *Mangada* cedante jam unu fojon, estas preta ankaŭ cedi duan fojon, sed kondiĉas, ke oni konsideru la inviton al Madrid kaj fiksu tempon.

S-ro *Privat* demandas, ĉu kongreso en 1931 povos kontentigi la hispanajn samideanojn, kvankam estas treege malfacile decidi kelkajn jarojn antaŭe pri tia grava aranĝo. Ĉiam ekestas poste malhelpoj.

S-ro *Pino* atentigas, ke jam en Ĝenevo li invitis por Madrid. Estas tamen necese decidi pri tio.

S-ro *Kreuz* ankaŭ al S-ro Pino respondas, ke I. C. K. tute formale skribis al H. E. A. por peti detalajn klarigojn kaj sciigon pri eventuale oficiala invito. Respondo ne venis, malgraŭ redemando. Aliflanke la invito de Budapest estis oficiale subtenita.

S-ro *Pino* kontentiĝas, se oni decidos pri tio en proksima jaro.

S-ro *Schoofs* proponas kaj subtenas Budapest por 1929. En Antverpeno ni decidu oficiale pri tio kaj poste rekomencu la regulon ne plu decidi pri templimo pli longa ol du jarojn.

D-ro *Privat* konsentas kun tiu ĉi propono.

La kunsido estas poste interrompata por kvaronhoro.

Post remalfermo D-ro *Kliemke* petas pri fiksigo de regulo, ne decidi por pli malfrue ol unu aŭ maksimume du jaroj antaŭe.

La kunsido transdonas tiun ĉi rekomendon al I. C. K. La diskuto pri tiu ĉi temo per tio finas.

Dua temo: Radio-propagando kaj statistiko.

D-ro *Doehler* raportas pri sia radio-statistiko, kiu montras ke ĝis nun 137 stacioj aŭ sendas aŭ iam sendis Esperanton. Li proponas enketon pere de special-cirkuleroj kaj pri tio interrilatos tuj kun I. C. K. por aranĝi la detalojn.

D-ro *Privat* sciigas, ke S-ro Kreuz kiel reprezentanto de Radio-Genève ĉeestos la proksiman Radio-Kunsidon en Como (Italujo), kiu fiksas la detalojn pri la realigo de la diskonigita radio-rezolucio favora al Esperanto. Li petas, ke ĉiuj radio-propagandistoj tuj interrilatu kun I. C. K. por entrepreni kaj prepari la necesan.

S-roj *Mangada* kaj *Orengo* informas pri radio-movado en sia lando. La lasta rekomendas centrigon de ĉio ĉe I. C. K. kun kiu la Itala Federacio kunlaboras konstante.

D-ro *Dietterle* uzas la okazon por memorigi pri la neceseco de bona statistiko kaj D-ro *Doehler* sciigas interesan proponon, kiel progresigi ĝin. D-ro Dietterle diras, ke ĉiutage li ricevas demandojn por statistikoj, sed ne povas ilin respondi, ĉar la esperantistoj ne liveras la necesan ciferaron. La ciferoj, kiujn li nun posedas, ne estas imponaj kaj montras evidente, ke la rezulto ne estas kompleta.

S-ro *Glück* deziras klarigon, kiu estu kalkulata en la statistiko kaj proponas doni pli longan templimon.

D-ro *Dietterle* sciigas, ke ĉiujn demandojn li detale respondis en la diversaj publikigaĵoj. Ne estas eble plilongigi la templimon ankoraŭ pli, ĉar alie la denombrado neniam finas kaj la ciferoj malaktualiĝas denove.

Pro manko de tempo la delegitoj ne raportas pri la stato de l' movado en diversaj landoj.

Fino de l' kunsido je 17,10 h.

D-ro Privat kun ĉeĥoslovakaj samideanoj

2-a Labora Kunsido

la 2 Aŭgusto 1927 en la Aŭlo de l' Teknika Altlernejo.

Komenciĝo je 10,05 h. Prezidas: D-ro Privat, prez. de I. C. K.

Raporto de la Lingva Komitato kaj Akademio

S-ro Warden, vic-prez. de l' Akademio, malfermas la kunsidon per detala kaj interesa resumado pri laboroj de l' Akademio, kiu konfirmiĝas laŭ enhavo kun la raporto speciale publikigita pri tiu ĉi temo de niaj lingvaj institucioj al la Deknaŭa.

Poste D-ro Privat raportas pri elparolado kaj konstatas, ke la interkompreno internacia estas perfekta. Temas nur pri ebleco de plia eleganteco per forigo de esceptaj malkorektaĵoj.

Resume: la konsonantoj ĝenerale estas bone elparolataj en Esperanto. Nur estas ia diferenco inter malsama elparolo de „r" en diversaj landoj. Ekstrem-orientanoj komence konfuziĝas pri uzo de „r" kaj „l", sed oni zorgas tie pri bona lernado pri tio. Aparte forigindaj estas ankoraŭ eraroj pri neklara diferenco inter molaj kaj malmolaj konsonantoj, bp, dt, gk ktp. Ankaŭ „s" kelkfoje sonas kiel „z".

Tre grava estas la elparolo de l' vokaloj. Italoj kaj slavoj plej bone elparolas ilin. Al angloj ili devas esti zorge instruataj. Sed la fakto, ke granda nombro da britoj senriproĉe elparolas, pruvas, ke per iom da klopodado ankaŭ tiu ĉi malhelpo estas venkebla.

Estas utile iom instrui la lernantojn pri fonetiko, por ke ili ne peku kontraŭ la fundamentaj reguloj de elparolado. Eraro estas ankaŭ, paroli pri longaj kaj mallongaj vokaloj, dume temas fakte pri fermitaj kaj malfermitaj vokaloj. D-ro Zamenhof elparolis *e* kaj *o* malfermite.

Grandan atenton oni devas dediĉi al la ritma akcento de Esperanto, de kiu dependas ĝia belsoneco. Ĝi evitas la difekton de la elparolo kaj la tranĉadon de silaboj.

La parolado kaŭzas viglan diskuton.

S-ro *Glück*, Berlin, subtenas la tezojn de D-ro Privat kaj rekomendas la uzon de l' komentaro de Christaller por faciligi la instruadon.

Prof. *Bujwid*, kiu plejparte konsentas kun la ideoj esprimitaj, rekomendas, ke oni en ĉiu kongreso faru modelan prelegon pri la elparolo de Esperanto, ĉar ne estas facile ĉion priskribi.

S-ro *Isbrücker*, s'Gravenhage, samopinias kun D-ro Privat pri la diversaj detaloj, sed li pledas kontraŭ tro rigida sistemo por principo de elasteco koncerne la elparoladon kaj kredas, ke tion ankaŭ celis D-ro Zamenhof.

S-ro *Merrick*, London, aludas ankoraŭfoje pri duboj de angloj pri la vokaloj, ĉefe pri „a" kaj „o".

S-ro *Stejskal*, Praha, faras kelkajn rimarkojn pri la elparolo de l' konsonantoj, kaj S-ro *Setälä* aparte kritikas la elparolon de „r".

Prof. D-ro *Dietterle*, Leipzig, pledas vigle por forigo de la erarigaj reguloj pri longaj kaj mallongaj vokaloj kaj subtenante la idearon de D-ro Privat, atentigas ĉefe pri la neceseco de subtila diferenco inter „ŝ", „j" kaj „ĝ".

S-ro *Ossaka*, Tokio, kritikas la ofte malbonegan elparolon de eŭropanoj, kiuj ne observas la regulojn pri klareco. Japanoj tre atentas pri tio, kvankam por ili la malfacilaĵoj estas pli grandaj ol kutime. Li ankaŭ kritikas la uzadon de landnomoj kiel Germanio, Latvio en oficiala raporto de UEA.

D-ro *Privat* respondas, ke laŭ la klasika libro de l' Akademio kaj artikolo § 15 de l' Fundamento oni rajtas uzi tiujn formojn, kiam ili estas internaciaj (Germanio apud Germanujo), sed oni ne rajtas uzi *-io* kiel sufikson. Tial UEA forigis neinternaciajn: Polio, Svisio, Britio ktp. Do tio nun estas en ordo.

S-ro *Nylen*, Stockholm, S-ro *Moy Thomas*, London, S-ro *Litauer*, Warszawa, kaj rektoro *Krieger*, Stettin, aliĝas al la diversaj kritikoj kaj proponas forigon de diversaj malfacilaĵoj per serioza atento pri elparolo, kiu kristaliĝas en deziresprimo al la Akademio, atenti pri tio, ke en niaj kongresoj oni parolu absolute modele.

S-ro *Warden*, Edinburgh, membro de la Akademio, transdonos la dezir-esprimon al la Akademio. Aliflanke li pledas por tio, ne tro malfaciligi la instruadon per pli ol necesa severeco. Ankaŭ li subtenas la ideon de S-ro Isbrücker pri elasteco en la elparolado.

Post kelkaj klarigaj paroloj de D-ro *Privat* finiĝas tiu ĉi interesa diskutado.

Tuj poste S-ro *Fr. Schoofs*, Antwerpen, montras tre interesan filmon pri la kongres-urbo de l' Dudeka, Antverpeno, en 1928, kaj rikoltas la koran dankon de ĉiuj ĉeestantoj. La film-prezentadon ĉeestas la belga konsulo en Danzig, S-ro Maurice Valcke.

Post tio oni disdonas al ĉiuj naciaj delegitoj grandiozan donacon jubilean, prezentitan de la firmo „Tri-Ergon", fabriko de gramofon-diskoj en Berlin, diskoj, kiuj inter alie aŭdigas la kongresan paroladon de D-ro Privat.

La ricevantoj per aplaŭdo kvitancas kaj akcentas la dankon al la ĉeestanta reprezentanto de l' firmo.

Fino de la kunsido je 13,45 h.

3-a Labora Kunsido

la 3 Aŭgusto 1927 en Ruĝa Salono de l' Kurhaus, Zoppot.

Komenciĝo 16 h. Prezidas: D-ro Privat, prez. de I. C. K.

La kunsido estas aparte dediĉita al la raportaro de oficialaj institucioj.

D-ro *Privat*, kiel prezidanto de I. C. K., resume prezentas la okazintaĵojn de la lasta jaro kaj la ĉeflaborojn faritajn laŭ la presite submetita

Raporto de Internacia Centra Komitato

Ankaŭ en la pasinta epoko la laboroj bone progresis. La presita raporto montras antaŭ ĉio la ampleksan korespondadon, kiun havis la sekretariejo de I. C. K., kaj kiu atingas dum la laborjaro 1926-27 la respektindan ciferon de entute elirintaj

2983 letersendaĵoj,
712 kartoj,
11093 presaĵoj.

Multa tempo estis uzita por la propagando en Ekstereŭropo, kie multloke sukceso estas konstatebla. I. C. K. konstatis la ekziston de esperantistoj en entute 127 landoj, kun kiuj ĝi havis rilatojn depost starigo de sia sekretariejo.

Bone efikis la dissendo de „Internacia Esperanto-Servo", kvankam ĝi estas ankoraŭ modesta helpilo. La komitato havas daŭran kontakton kun la grandaj internaciaj oficejoj. Ĝi agas laŭpove en la internaciaj kongresoj kaj konferencoj, kie prezentiĝas bona okazo. Bedaŭrinde la negrandaj monrimedoj ofte malhelpas pli efikan entreprenadon.

Ĉefaj sukcesoj de la pasinta laborepoko estas la sukceso ĉe la Sudslava Fervojaro, en kiu laŭ dekreto de l' Ministro de Trafiko, internaciaj vagonoj portos surskribon en Esperanto krom la devigaj nacilingvaj tekstoj. Aparte menciinda estas ankaŭ la konferenco „Paco per Lernejo", en kiu Esperanto modele ludis la rolon de ekskluziva traduka lingvo. La Ligo de Nacioj citis en sia oficiala raporto (akto A. II/15 (a) 1026) la efektivigon de sia sugesto pri akcepto de Esperanto kiel „lingvo klara".

Ankaŭ en la kampo de l' poŝto Esperanto bone progresas. La poŝta administracio de Danzig aperigis specialajn poŝtkartojn ilustritajn kun surskribo en Esperanto. Dank' al la klopodado de niaj rusaj amikoj la rusa poŝta administracio jam aperigis plurajn eldonaĵojn en Esperanto aŭ kun Esperanto-surskribo kaj surprizis la Deknaŭan per aperigo de aparta jubilea marko kun la bildo de D-ro Zamenhof. D-ro Privat dankas aparte kore al la amikoj en Sovet-Ruslando, kiu faris tiom da bona kaj modela laboro por nia komuna lingvo.

En radio-sfero laŭ iniciato de Radio-Genève la Internacia Unio de Radiofonio akceptis unuanime rekomendon al la stacioj pri provo de regula dissendo en Esperanto unufoje ĉiusemajne kaj la anoncadon ĉiutagan de l' stacio en Esperanto.

Krom tio I. C. K. laboris pri Esperanto en lernejoj, statistiko (pri kiu aparte estis raportite en la 1-a laborkunsido), pri propagando per vojaĝoj de S-ro Che, sekretario de l' komitato, pri ŝlosiloj de Esperanto, el kiuj vico da novaj aperis kaj ankoraŭ aperos dum tiu ĉi jaro.

Ĉiujn detalojn montras la presita raporto en la Kongreslibro, kiu ankaŭ reaperos en la Oficiala (Verda) Dokumentaro.

D-ro Privat esprimas dankon al la institucioj, kiuj bonvolis helpi al la klopodado per regula kunlaborado kaj aparte kore dankas al la korespondantoj de I. C. K., kiuj donis sian malavaran financan helpon por progresigi nian aferon.

Li dankas plue kaj speciale al S-ro Che, sekretario de I. C. K., kiu nun estas vokita de sia episkopo por repreni postenon en Rumanujo, pro la granda zorgo, kiun li uzis por servi al nia idealo.

Li skizas fine ankoraŭ la ĝenerale malfacilan situacion de la sekretariejo, kiu konstante devas peni kaj klopodi pri reguleco de l' rilatoj kaj entreprenadoj. Ofte tiu klopodado povas aperi kiel insistado, sed ĝi estas necesa. La konferenco de Praha ne nur konsentis al la ĝisnuna labormaniero, sed eĉ rekomendis ĝin konservadi ankaŭ estonte.

Li esprimas sian dankon al la ĝenerala sekretario de I. C. K., S-ro Robert Kreuz, kiu tre konscience plenumas la laborojn al li konfiditajn, kaj petas, subteni kaj faciligi lian tre ampleksan laboron.

La raporto estas akceptata aplaŭde.

Raporto de Konstanta Reprezentantaro.

S-ro *Fr. Schoofs*, sekretario-kasisto de K. R., alportas unue la korajn salutojn kaj bondezirojn de S-ro H. Petiau, prezidanto de K. R., kiu pro profesia devo bedaŭrinde ne povas ĉeesti la kongreson.

Li raportas pri la laboro de Konstanta Reprezentantaro dum la administra jaro 1926—27. Ke la organiza sistemo taŭgas, montras la pliiĝanta sumo de l' enkasitaj kotizoj al nia centra organizo.

La naciaj societoj pagis

	Frk. sv.
en la jaro 1923 entute	1716.95;
en la jaro 1924 entute	2651.54;
en la jaro 1925 entute	2950.—;
en la jaro 1926 entute	3120.60.

Mankas ankoraŭ la pago de 3 societoj, tiam la sumo enspezita atingos rondcifere 3500.— svisajn frankojn. Entute tiuj ciferoj montras laŭgradan supreniron, kiu esperebl e daŭros ankaŭ en la nova jaro.

En la pasinta administra jaro Rumana Esperantista Societo kaj Sudslava Esperanto-Ligo aliĝis al K. R.

S-ro Schoofs petas la naciajn organizojn kaj societojn subteni ankaŭ en estonto la klopodadon de K. R., tiamaniere helpante al plia fortigo de nia organiza sistemo, sankciigita per la kontrakto de Helsinki.

Post diskonigo de l' raport-detaloj la kunsido unuanime aprobas la raporton.

Raporto de la Organiza Komitato por la Zamenhofa Monumento.

S-ro *Warden*, Edinburgh, membro de la Monumenta Komitato, buŝe ankoraŭ klarigas la mallongan raporton de la Organiza Komitato de l' Zamenhofa Monumento. Restas en la kaso la sumo de ĉirkaŭ 67.16.7 funtoj sterlingaj, kiun la komitato decidis transdoni al la familio Zamenhof por uzo por la monumento kaj tombo. Neniu alia utila sugesto pri utiligeblo de l' mono alvenis.

S-ro Warden transdonas la salutojn de S-ro Applebaum, honora sekretario de la komitato, kiu ne povas ĉeesti la kongreson.

D-ro *Privat* memorigas, ke I. C. K. faris la proponon, transdoni la restantan monon al la L. K. K. de l' Dekkvina en Vieno por helpi la malfeliĉajn samideanojn, kiuj suferas pro la deficito.

S-ro *Warden* respondas al tio, ke la komitato ne sentas sin kompetenta por uzi la monon por alia celo, ol por tio, al kio ĝi estis destinita per la kolekto mem.

S-ro *Essigman*, Warszawa, subtenas tiun ĉi opinion kaj proponas, ke eventuale oni faru novan kolekton por alia celo. La restanta monsumo bone taŭgos por certigi konservadon de la tombo.

La kunsido aprobas tiun ĉi proponon. La mono do estos transdonata al la familio Zamenhof.

D-ro *Privat* uzas la okazon, por kore danki al la membroj de Monumenta Komitato, samkiel al tiuj de la Loka Monumenta Komitato en Varsovio, pro la fidela kaj modela plenumo de sia tasko, unuavice al S-ro J. D. Applebaum en Liverpool, kiu gvidis la ĉefajn laborojn de la Komitato, al S-ro Warden, D-ro Robin k. a.

Prof. D-ro *Dietterle* memorigas sian plurfojan proponon, ke oni uzu la okazon de naciaj kongresoj, por sendi salutojn al ili el eksterlando Ili ĉiam bone impresas kaj tre utilas al la propagando. Same estas pri vizitoj de eksterlandanoj en naciaj kongresoj, kiuj povas fari grandan helpon al la varbado per la aplikado de nia lingvo kun interesitaj institucioj.

La kongreso notas la sugeston kiel apartan rekomendon.

S-ino *Herrnstadt-Oettingen*, Berlin, informas pri ĝojiga sciigo de S-ro Rickelt, prezidanto de l' Monda Teatro (Teatra Sindikato), laŭ kiu dum la gastludado de l' Monda Teatro en Parizo en proksima somero, interkonsente kun S-ro Firmin Gémier, ankaŭ okazos teatra prezentado en Esperanto.

S-ro *Balkanyi*, Budapest, submetas la dezir-esprimon, ke por progresigi nian literaturon kaj kompensi la oferemon de eldonistoj de Esperanto-verkoj unufoje en ĉiu jaro je fiksota tago, ekzemple la naskiĝtago de la Majstro, ĉiu esperantisto aĉetu almenaŭ unu libron.

La kongreso akceptas la sugeston por publikigo en la kongresa raporto.

S-ro *Steiner*, Wien, atentigas ĉe la fino ankoraŭ pri la favorigo de Esperanto de la policaŭtoritato de Vieno. La policistoj parolantaj Esperanton nun portas apartan insignon kun la surskribo Esperanto kaj stelon. Tiu ĉi paŝo povas servi kiel modelo por aliaj urboj kaj landoj.

I. C. K. jam kontaktis kun la Aŭstria Delegitaro pri tio kaj klopodos realigi similajon en diversaj landoj.

D-ro *Privat* en la lasta kunsido oficiala sur teritorio de la Libera Urbo Danzig esprimas plej koran dankon al la Loka Kongresa Komitato kaj precipe al la S-roj Aeltermann, Majorkiewicz, F-ino Marquardt, S-ro Sachsze, S-ro Mitschke, kaj F-ino Slottke pro la oferema kaj sindonema laboro, kiun ili faris por sukcesigi la kongresaranĝon. Li ankaŭ dankas al la junaj kaj novaj lernantoj de l' lasta kursaro en Danzig, kiu jam donis sian tutan helpon kaj kies nomojn citi unuope estas apenaŭ eble. La Deknaŭa kaŭzis multan laboron kaj grandajn zorgojn pro multflanka malhelpo kaj necerteco pri partopreno de nia samideanaro. Sed ni povas konstati, ke la kelkfojajn kaj neniam eviteblajn mankojn en tia granda aranĝo plene forviŝas la ĉefa impreso, ke la Deknaŭa estis grandega sukceso.

Li premas la manon al S-ro Aeltermann kun la peto, esprimi personan dankon al ĉiuj.

S-ro *Aeltermann* kortuŝite dankas en la nomo de ĉiuj menciitoj kaj petas pri senkulpigo, ke diversaj aferoj ne marŝis tiel, kiel la komitato mem deziris. En la lasta kongres-semajno la kongresanaro duobliĝis kaj estis malgraŭ sperta helpo, disponigita de I. C. K., organize ne eble, plenumi ĉion, kion lastahore oni postulis. La konstaton, ke la Deknaŭa tamen estas sukceso, la Danciganoj akceptos kontente kiel kompenson por sia dummonata laborado.

Je la fino S-ro Aeltermann ankoraŭfoje dankas al ĉiuj aŭtoritatoj, kiuj tiel afable helpis la kongreson kaj esprimas sian specialan dankon al la gazetaro de Danzig, kiu en mezuro, apenaŭ vidita ĝis nun, donis ĉiun favoron al nia kongreso.

Fino de la kunsido je 18.25 h.

* * *

Ceremonio ĉe la Tombo de D-ro Zamenhof en Varsovio,

la 5 Aŭgusto 1927 en la Hebrea Tombejo.

Komenciĝo je la 10.30 h.

S-ro *Essigman*, Varsovio, en la nomo de l' Loka Monumenta Komitato direktas kelkajn parolojn al la delegitoj, asistantaj al la ceremonio ĉe la tombo, kaj donas la parolon al la oficiala delegito de la Ministerio Pola de Eksteraj Aferoj.

S-ro D-ro *Leon Klimecki* en Esperanto transdonas la simpatiesprimon de la Ministro de Eksteraj Aferoj de Polujo kaj en simpla sed emociiga maniero memorigas pri la vivlaboro de unu el la plej grandaj filoj de pola tero Zamenhof, kies idealo interligas nin ĉiujn.

S-ro *Pyke*, Aŭstralio, memorigas pri la klopodado de l' Monumenta Komitato, kiu trovis malavaran helpon el ĉiuj partoj kaj kontinentoj de l' mondo. Li legas leteron de S-ro Applebaum, Liverpool, kiu sendas siajn salutojn kaj korsentojn je la memoro de l' majstro.

S-ro *Warden*, Edinburgh, solene laŭdas la solidarecon de la esperantistaro, kiu kun tiom da simpatio progresigis la laborojn de la Monumenta Komitato. La granita ŝtono de l' tombo simbole montras la firmecon de l' fideleco al la benata Majstro.

Post tio D-ro *Privat*, prezidanto de I. C. K., sincere dankas al la Monumenta Komitato, antaŭ ĉio al S-roj Applebaum, Pyke, Warden, kaj al la Loka Komitato, S-ro Essigman kaj ceteraj, pro la sindonema plenumo de la transprenita tasko. Esprimante sian tutan simpation al la ĉeestantaj familianoj Zamenhof, li kortuŝe memorigas pri la idealo de Zamenhof kaj liaj lastaj tagoj dum la granda milito. La Majstro deziris, ke la esperantistaro ne nur pensu pri nia lingvo, kiel nura interkomprenilo, sed ke ankaŭ ĝian celon ĝi ekkonu kaj konservu spirite kaj anime. En la nomo de l' Jubilea Kongreso li metas imponan florkronon sur la tombon de D-ro Zamenhof. Fine li honoras la karan akompanantinon de l' Majstro, Klara Zamenhof, kiu modeste kaj fidele helpis lin en lia laboro kaj petas S-inon Privat meti buketon da krizantemoj sur ŝian tombon apud la tombo de l' Majstro. Ĥoro en la fono tiam kantas la himnon „La Espero“.

Sekvas alparoloj de S-ro *Rogović*, pole, en la nomo de la urbestraro de Varsovio, kaj de Rabeno *Feldstejn*, prezidanto de la Hebrea Komunumo, kiu en malnovhebrea lingvo benas la memoron de granda filo hebrea kaj idealisto Zamenhof. Majoro *Mangada-Rosenörn*, Madrid, kiel reprezentanto de la hispana registaro laŭdcitas la verkon de Zamenhof kaj deklaras plej alta idealo la internan ideon de l' esperantismo.

Post tio reprezentantoj de diversaj nacioj aŭ salutas la Majstron aŭ metas florojn kaj florbukedojn sur la tombon de D-ro Zamenhof.

Listo de l'reprezentantoj:

Anglujo: S-ro Boutwood;
Aŭstrio: S-ro Steiner;
Bulgarujo: S-ro Tričkov;
Estonio kaj Finlando: S-ro Setälä;
Ĉeĥoslovakio: S-ro Krysta;
Francujo: S-ro Delanoue;
Germanujo: S-ino Herrnstadt-Oettingen;
Hispanujo: S-ro Pino;
Hungarujo: S-ro Balkanyi;
Hebreoj: S-ro D-ro Dreher (hebree kaj esperante);
Japanujo: S-ro Ossaka;
Nederlando: S-ro F. Onnen;
Polujo: Prof. O. Bujwid;
Sovet-Ruslando: S-ro E. Drezen;
Skotlando: F-ino Jane Baird;
Svedujo: S-ro Nylen;
Svislando: S-ro D-ro Spielmann;
Sudslavio: S-ro Friedländer;
Usono: S-ro Hamann.

S-ro *Leon Belmont*, Varsovio, kiel esperantisto de la unuaj tagoj kaj el la intima rondo de l' Majstro emocie laŭdkantas la idealismon de l' granda kreinto, kies modesteco kaj sincereco superis ĉion. Lia spirito gvidu nin ĉiam kaj lia alta sento disflugu tra la mondo senfine kaj senfine.

La ĥoro kantas la lastan strofon de la „Espero“ kaj la solena ceremonio finiĝas je tagmezo.

* * *

Ferma Kunsido

la 5 Aŭgusto 1927 en la Urbdomo de Varsovio, Plac Teatralny.

Komenciĝo je la 16,50 h.

S-ro *Essigman* kiel prezidanto de la Varsovia L. K. K. malfermas la kunsidon kaj post mallonga saluto transdonas la gvidadon al D-ro Privat.

D-ro *Privat*, kore bonvenante la ĉeestantojn de la ferma kunsido sur pola teritorio, proponas kiel prezidanton Prof. O. Bujwid kaj sugestas la pligrandigon de la kongresa estraro per elekto de Honora Komitato, konsistanta el la

S-ro Essigman,
S-ino Essigman,
S-ro D-ro Czubrynski,
S-ro L. Belmont,
F-ino Sofja Zamenhof,
F-ino Lidja Zamenhof.

La kunsido unuanime kaj aplaŭde akceptas tiun ĉi proponon.

Prof. *Bujwid* post tio bonvenigas la ĉeestantajn reprezentantojn de la ŝtato kaj de la urbo de Varsovio, kiuj honoras la kunvenon. Li proponas sendi saluttelegramon al la prezidanto de la Pola Respubliko kaj al Marŝalo Pilsudski. Ankaŭ tiujn proponojn la kunveno akceptas.

S-ro *Leono Zamenhof* ekprenas la parolon por profunda skizo de la sentoj, kiuj pulsas en li, la frato de la mortinta Majstro. Li memoras pri la tago, kiam Esperanto aperis kaj li konstatas la brilan vojon, kiun intertempe faris Esperanto. Aludante al la pola „koridoro“, kiun ĵus la kongresanoj traveturis, por atingi Varsovion de Danzig, li esperas, ke tra ĝi la hejmlando de l' Majstro ricevu novan puŝon por pli ampleksa interesiĝo pri Esperanto. Kvankam profeto en sia lando ne valoras, li esperas, ke la kongresa kunsido en Varsovio kaj la impreso de l' Jubilea Kongreso ne restos senefikaj en Polujo.

La prezidanto de la urbo Varsovio, S-ro D-ro Slominski, en la nomo de la urbo kore bonvenigas la kongresanaron. Polujo ĉiam interesiĝas kaj luktis por unuiĝo kaj interpaciĝo de l' homoj. Rilate la lingvon internacian li kredas, ke estas ambicio de lia hejmlando stari en la unua vico. Li bondeziras plenan sukceson de nia laboro.

F-ino Lidja Zamenhof tradukas la polan paroladon tuj en Esperanton.

D-ro *Privat* sin turnas al la Urba Prezidanto kaj la kongresanaro. Li esprimas sian ĝojon al la sendependeco de Polujo kaj diras, ke li mem dum jaroj batalis por ĝi. (Aplaŭdo.) Ĉiu nacio havas rajton pri memstareco kaj estas necese, ke oni ĝin donu al ĉiuj. Ne devas plu okazi la maljustaĵoj de jarcentoj, ke oni rifuzas la lumon al malgrandaj nacioj. Por ke la mondo vivu en pli harmonia atmosfero, estas necese, ke la popoloj interkompreniĝu kaj povu interkompreniĝi. Por tio laboris D-ro Zamenhof, la granda amiko de l' homoj kaj la okulisto Varsovia en ulica Dzika. Kun emocio li vizitis hodiaŭ matene la domon en la nomita strato Dzika. Li emas esperi, ke en proksima tempo, kiam, revenonte al Varsovio kun blankaj haroj, ni denove trairas la straton, ĝi portos la nomon de Zamenhof. (Plurfoje ripetiĝanta aplaŭdo.) La granda poeto pola Mickiewicz kaj la modesta, malriĉa okulisto Zamenhof laboris por sama celo, ke ĉesu la mensogo kaj kalumniado kaj ke la popoloj montru pli noblan animon.

S-ro *Leon Belmont* kun granda talento majstre tradukas la paroladon en polan lingvon kaj ripetigas la aplaŭdon de l' pola ĉeestantaro al la sentoj simpatiaj, kiujn esprimis D-ro Privat.

S-ro urbestro *Lindhagen*, Stockholm, en sveda lingvo salutas la urbon de l' ferma kunsido, Varsovio, esprimante sian kontentecon pri tio, ke li, svedo, hodiaŭ povas amike kaj plenkore viziti samcelanojn en Polujo, post kiam pasis la malnova epoko, en kiu Polujo kaj Svedujo luktis en grandaj bataloj. S-ro Johanssen tradukas.

S-ro Prof. *Kronenberg* en la nomo de l' redakcio „Epoca“ de Varsovio bonvenigas la gastojn kaj dankas al la gazetaro pro ĝia granda subteno kaj valora helpo.

Kaptante la dezir-esprimon de D-ro Privat pri nomigo de la strato Dzika laŭ nomo de Zamenhof, li esprimas la esperon, ke tiu ĉi alinomigo estu decidata en plej proksima kunsido de la Urba Parlamento en la sama salono. La kongresanaro aplaŭdegas tiun ĉi sugeston kaj vigle turnas sin, ripetante la aplaŭdon al la ĉeestantaj reprezentantoj oficialaj.

La saluta parto estas radie disaŭdigata. Same „La Espero“, kiun belsone prezentas la ĥoro, kiu jam kantis ĉe la tomba ceremonio.

Komenciĝas la labora parto de la kunsido kun la

Raporto de Universala Esperanto-Asocio

D-ro *Privat*, kiel prezidanto de UEA, skizas la situacion de la Asocio kaj la malfacilaĵojn, kiujn ĝi havis en la pasintaj kaj ĉefe en la lasta jaro. Li legas leteron de S-ro Jakob, Direktoro de UEA, kiu pro ŝparo de l' kostoj ne venis al la kongreso kaj kiu alvokas la samideanojn ne forgesi, kiom gravan rolon ludas UEA por la praktika aplikado de nia lingvo.

D-ro Privat priskribas la diversajn laborojn laŭ la detala raporto, submetita al la kongreso, kaj substrekas, ke nenio estas preterlasata por perfektigi UEA. Sed por tio necesas la helpo de ĉiuj samideanoj, kiuj nun aŭ aliĝas nur por mallonga tempo aŭ eĉ tute ne aliĝas.

S-ro *Balkanyi* kiel malnova ĉefdelegito de UEA elokvente elmontras la gvidantan rolon de UEA kaj alvokas por energia helpo. Kio estus Esperanto praktike sen UEA, li alvokas, kaj kion ni farus, se oni devus ekzemple decidi, ke pro nesufiĉaj monrimedoj la jarlibro ne plu aperu. Li memoras pri la fondintoj de UEA, unuavice pri Hodler, kaj petegas la kunsidon vigle esprimi sian koregan dankon al ĉiuj, kiuj kunlaboris por antaŭenpuŝi UEA kaj el kiuj devas esti nomataj antaŭ ĉio la nomoj de Stettler, Privat kaj Jakob.

D-ro *Privat* prenas sur sin, transdoni la simpati-esprimon al la nomitaj samideanoj Stettler kaj Jakob.

La postaj alparoloj de diversaj delegitoj fariĝas unueca manifestacio favore al UEA.

S-ro *G. Delanoue*, Ĉefdelegito en Paris, laŭdas la organizadon de UEA kaj alvokas la naciajn societojn pri pli intima kunlaboro. Li vidas grandan eblecon por helpi al UEA, se oni alvenos al fiksado de unika kotizo kombinita. Sen UEA nia movado restos skeleto. Ĝia organizo certigas al ni la aplikeblon de nia lingvo.

S-ro *Robert Kreuz*, ne kiel profesia esperantisto, sed malnova praktikulo, atentigas pri la graveco de la UEA-organizo. Li citas resume la praktikan aplikadon de Esperanto per helpo de l' UEA-sistemo kaj montras sur bazo de spertoj en la propaganda laboro por la foiro de Frankfurt, ke sen UEA tiaj valoraj laboroj ne estus efektivigeblaj. La praktika flanko de nia movado estas gravega. Ankaŭ de ĝi dependas multe, ĉu nia afero rapide aŭ malrapide antaŭeniras. Kiel ĝenerala sekretario de I. C. K. li ankaŭ esprimas sian koran kaj kolegan dankon pro la helpo, kiun UEA donis al I. C. K. en la komenco de ĝia funkciado kaj ankoraŭ nun dum malfacilaj momentoj.

S-ro *Isbrücker*, s'Gravenhage, substrekas la signifon de UEA kaj deziras, ke la esperantistoj ĝin subtenu per ĉiuj fortoj. Tre sprite li diras, ke ĝi estas la vapormaŝino de la Esperanto-movado, al kiu devas alkroĉiĝi ĉiuj, kiuj deziras antaŭenpuŝi nian aferon.

Ankaŭ S-ro *v. Frenckell*, Dresden, aliĝas al tiu ĉi opinio. Li laŭdas la laboron de la delegitoj kaj prezentas kiel modelon S-ron Essigman, la organizanton de la pilgrimado al Varsovio. Li esprimas je tiu ĉi okazo en la nomo de ĉiuj plej koran dankon al Ges-roj Essigman pro ilia granda laboro por la aranĝoj de Varsovio.

S-ro D-ro *Privat* en la nomo de la oficialaj institucioj de nia movado faras la samon.

S-ro *Jan Tichawski*, Katowice, alvokas al samideanoj en Sovet-Ruslando denove aliĝi al UEA.

S-ro *Gabowicz* donacas al D-ro Privat plaketon de Zamenhof en gipso.

D-ro *Privat* petas permeson transdoni tiun belegan modlaĵon al la biblioteko de nia Majstro.

Li uzas la okazon por transdoni ankaŭ al S-ro Lublielski, la skulptisto de la tomba ŝtono de Zamenhof, plej koran dankon pro lia bonega laboro kaj invitas lin, sidi sur la estrara podio.

Antaŭ la fino S-ro *Szapiro* donas ankoraŭ kelkajn utilajn informojn pri la postkongreso en Bialystok kaj la ceremonio ĉe la naskiĝdomo de D-ro Zamenhof.

Laŭ propono de D-ro *Privat*, kiu memorigas pri la malnovaj pioniroj de nia movado, la kunsido decidas, sendi salut- kaj dank-telegramon al S-ro Generalo Sébert en Parizo. (Aplaŭdo.)

Post kelkaj kuraĝigaj vortoj kaj dankesprimo al ĉiuj, kiuj kunhelpis sukcesigi la Deknaŭan kaj precipe la aranĝon en Varsovio, Prof. *Bujwid* fermas la kunsidon kun kora „Ĝis revido en Antverpeno!"

Fino de l' kunsido je 18,50 h.

Grupo da kongresanoj ĉe la monumento en la Esperanto-Grund, Zoppot

Solena Inaŭguro de Memortabulo sur la Naskodomo de D-ro L. L. Zamenhof

Bialystok, 7 Aŭgusto 1927.

Je la 14-a horo alvenas la oficialaj reprezentantoj kaj la vojvodo, kiun la ĉeestanta orkestro de la 3-a Pafista Regimento salutas per ludado de l' marŝo „Vivu Esperanto".

Post tio la vojvodo S-ro inĝ. *M. Rembowski* suriras la verde ornamitan tribunon antaŭ la naskodomo kaj faras la sekvantan paroladon en pola lingvo:

Sinjorinoj kaj sinjoroj,

Homoj mortemaj iĝas senmortaj nur per la agoj, kies movilo estis ilia kreanta spirito.

Al tiaj senmortuloj apartenas sendube D-ro Ludoviko Lazaro Zamenhof, aŭtoro de Esperanto.

Tia genia homo kreis pro pure idealaj motivoj novan, universalan lingvon, dezirante per ĝia helpo alproksimigi spirite popolojn de la tuta homaro kaj doni al ili eblecon interkompreniĝi pri ĉiuspecaj demandoj. La kreinto de Esperanto deziris, ke per tiu universala lingvo ĉiu loĝanto de la tero povu esprimi ĉion, kio estas komuna por la tuta homaro — ĉiujn virtojn kaj sentojn kaj agojn, kiuj estas resumeblaj en granda ĉiuflanke komprenata ideo „amo al la proksimuloj".

Tiu celo estas vere ideala, sed en ĝi certe estas forto, ĉar tiu idealo vivas kaj efektiviĝas kaj tia ja estas la leĝo de l' vivo, ke vivas nur tio, kio havas forton por vivi.

Pruvo de vivanteco de Esperanto estas la ĉiam pli granda disvastiĝo, pruvo de vivanteco estas tio, ke en vicoj de ĝiaj adeptoj estas ankaŭ ŝtathomoj kun larĝvidaj pensmanieroj, eminentaj scienculoj, pruvo fine estas ankaŭ la honoro, kiun en la nuna momento kaj en tiu maniero ni esprimas al ĝia kreinto.

La vojvodo post tio forprenas la drapon, kiu kovras la memortabulon. La orkestro ludas la polan nacian himnon.

Vigla aplaŭdo sekvas, en kiu ankaŭ partoprenas la publiko, kiu grandamase staras en la strato kaj sur ĉiuj balkonoj de la najbardomoj.

S-ro Jak. Szapiro, prezidanto de la Organiza Komitato kaj de Zamenhofa Esperanto-Societo en Bialystok, tradukas la paroladon en Esperanton.

La orkestro ludas la himnon kaj tiam la vicurbestro S-ro *W. Luszczewski* legas la jenan paroladon:

Sinjorinoj kaj sinjoroj,

Dank' al la genio de nia samurbano D-ro Ludoviko Zamenhof, lia naskiĝurbo havas hodiaŭ la honoron, gastigi en siaj muroj multnombrajn reprezentantojn de multaj popoloj de la mondo.

Tial do, kiel reprezentanto de tiu urbo, mi sentas agrablan devon, kore saluti la ĉeestantajn tie ĉi delegitojn kaj pruvi tiun grandan simpation, per kiu la loĝantaro de la urbo ĉirkaŭas la hodiaŭan solenajon.

Komprenante la grandegan signifon de la lingvo Esperanto por internaciaj rilatoj, nia urbo, tuj post la reakiro de sendependeco de Polujo, sentis la devon pruvi la grandan estimon al la kreinto de tiu lingvo kaj — kiel unua pruvo de tiu estimo — ĝi decidis nomi la straton en kies unu domo ekvidis la lumon de l' tago D-ro Zamenhof, per lia nomo. Tio estis la unua etapo de honorigo de la granda kreinto. Hodiaŭ ni estas atestantoj de dua etapo de tiu estimo, la malkovro de memortabulo.

Mi ne dubas, ke la hodiaŭa solenaĵo, ligita kun la nomo de nia granda civitano, ne estas la lasta. Mi estas konvinkita, ke la Loka Esperantista Societo iniciatos starigon de monumento al tiu meritplena civitano en lia naskiĝurbo (aplaŭdego), per kio ĝi helpos al vasta propagando de lia granda eltrovaĵo inter ĉiuj popoloj.

Dezirante al vi, gesinjoroj, plej bonajn rezultojn de la nuna Postkongreso, mi plej multe dankas en la nomo de la urbo al vi, tre honorindaj sinjoroj delegitoj, pro la bonvola honorigo per via ĉeesto de nia modesta solenaĵo de malkovro de memortabulo je honoro de meritplena aŭtoro de la internacia lingvo Esperanto kaj nia samurbano.

S-ro *F. Kurjanski*, sekretario de la Zamenhofa Esperanto-Societo, kun multa aplaŭdo tradukas la paroladon en Esperanton.

Kiel oficiala reprezentanto de I. C. K. S-ro *Robert Kreuz*, Generala Sekretario de I. C. K., faras la sekvantan paroladon en Esperanto:

Altaj oficialaj reprezentantoj,
Estimata Familio Zamenhof,
Homaranoj el la tuta mondo,

En la nomo de l' Internacia Centra Komitato de la Esperanto-Movado en Genevo kaj aparte en la nomo de ĝia prezidanto D-ro Privat mi alportas al vi la korajn salutojn kaj bondezirojn al la inaŭguro de memortabulo sur la naskodomo de nia majstro.

En tiu ĉi festa momento kvazaŭ en filmo preterpasas miajn okulojn la tuta historio de nia Esperanto-movado.

Mi vidas en tiu ĉi modesta ligna domo la naskiĝon de infano, pri kies destino kaj sorto nenion povas antaŭscii la feliĉaj gepatroj.

Mi renkontas pli poste la naskiton, kiel knabo, knabo ne ludanta en la stratoj kun samaĝuloj, sed revema, pripensema spirito. Li ne toleras malbonon kaj li suferas vidante ĉirkaŭ si kalumniadon kaj malamon, kiun kaŭzas la neebleco interkompreniĝi reciproke.

Kaj en tiu ĉi multlingva medio, kies specialan karakteron konstati ni mem havas okazon hodiaŭ en tiu ĉi urbo, naskiĝas en la knabo jam la ideo havigi ilon por eviti tiujn fenomenojn; maturiĝas la ideo pri internacia helplingvo.

Kreiĝas Esperanto, montriĝas malfacilaĵoj kaj mokado, sed Esperanto iras en la mondon. Kaj ĝi faras sian vojon. Sekvas la periodo de unuaj kaj grandaj sukcesoj kaj la vico de niaj mondkongresoj.

Tie mi vidas la Majstron, la modestan kaj kvietan homamikon en la kongreso de Berno en 1913, starantan kvazaŭ ia samideano simpla en la mezo de siaj entuziasmaj adeptoj kaj sindone aŭskultantan la himnon. Povis havi li la firman konvinkon, ke lia kreaĵo havas estontecon.

Venis la mondmilito, la plej granda kataklismo, pri kiu scias la historio de l' lastaj jarcentoj. Brulis la mondo, interbatalis la popoloj.

Miloj, ja centmiloj mortis en batalkampo aŭ pro malsano. Ankaŭ li; kaj ni povas diri, ke ankaŭ li fariĝis viktimo de tiu milito. Suferis li pro la suferado de l' homoj, rompiĝis la koro de l' Majstro benata, amanta la tutan homaron. Kaj mi memoras ankoraŭ pri malvarma pluvema Apriltago, kiam ni soldatoj, sopirantaj pri la paco, eksciis: la Majstro mortis. Malĝojo nin kaptis, ĉar ni ja tiom esperis pri la venko de lia kaj nia interna ideo.

Stoike ni, liaj adeptoj, tamen daŭradis la laboron en lia spirito.

Venis fine la paco, tiom sopirata de l' tuta mondo.

Kaj la afero kreskis, disvastiĝis. Esperanto fariĝis movado, kies grandeco hodiaŭ imponas al la mondo. Ne povis plu vidi li, la Majstro amata, la venk-iron de sia ideo, bedaŭrinde! Ja mortis lia korpo, sed ne lia spirito.

En la jubilea jaro, post 40-jara ekzisto de Esperanto, centoj da samideanoj pilgrimadis al Varsovio, kie ripozas Zamenhof. Kelkaj el ni hieraŭ estis en lia iama laborĉambro, tiu sanktejo, el kiu li, tiu granda geniulo, spirite gvidis nin kaj kie homamo kaj respekto pro li plenigis nian koron.

Kiam dum la solena ceremonio ĉe lia tombo antaŭ du tagoj fidelularo eldiris ĵuron, ankaŭ estonte defendi lian grandan verkon, kaj kiam korpremo malebligis al multaj paroli, mi vidis papilion, spirale ĉirkaŭflugantan la tombon, kvazaŭ simboligante la disradiadon de l' spirito, kiu eliras de li kaj kiu naskiĝis en tiu ĉi modesta domo.

Estu tiu spirito nia direktilo ankaŭ en estonto. Lumu, brilu, disradiu ĝi kiel antaŭsigno de tempo, multe pli feliĉa ol la nuna! (Aplaŭdo.)

Prof. D-ro *O. Bujwid*, Krakow, parolas pole kaj esperante en la nomo de Pollanda Esperanta Delegitaro. Dum la aplaŭdo la orkestro ludas strofon de la himno.

Fine la prezidanto de Hebrea Komunumo en Bialystok, S-ro *A. Tyktin*, salutas la venintojn al la solenaĵo en juda lingvo kaj deziras sukceson al la esperanta movado, iniciatita de la granda Bialistokano D-ro Zamenhof. (Aplaŭdo.)

Per komuna kantado de la himno sub akompanado per la orkestro la solenaĵo finiĝas je la 15,30.

La vojvodo, vicurbestro, polica komandanto, la reprezentanto de I. C. K. kaj la familianoj Zamenhof, gvidataj de la prezidanto S-ro Jak. Szapiro, vizitas la malriĉan loĝejon, en kiu naskiĝis la aŭtoro de Esperanto. Kun speciala intereso oni rigardas la etan ĉambron, en kiu li naskiĝis.

Tiujn loĝejon kaj ĉambreton vizitas poste ĉiuj kongresanoj en malgrandaj grupoj, pro la malgrandeco de la loĝejo.

Poste daŭras la aranĝoj de la postkongreso al Bialystok.

Esperanto sur la germana ondo Königswusterhausen, ondo 1250

De Novembro pasintjara mi faras ĉiusabate prelegojn pri la lingvo Esperanto interne de „Pedagogia Radiado", aranĝita de „Zentral-Institut für Erziehung und Unterricht" — Centra Instituto por pedagogio kaj instruado — Berlin W 35; celo estas, enkonduki german-lingvanojn en la praktikan uzadon de Esperanto. Kiel helplibro estas uzata la unua radio-kajero pri Esperanto el la kolekto Niemann kaj Voss (eldonejo: Julio Beltz, Langensalza). La preleganton helpas dua parolant(in)o tiel ke la prelego fariĝas vera instrusceno antaŭ la mikrofono.

Kiel mi supozis, la prelegoj estas aŭskultataj ne nur en Germanujo, sed ankaŭ en aliaj landoj de german-lingvanoj kaj same de negerman-lingvanoj. Interese estas, ke el Anglujo oni skribis, ke en lernejo la Esperanto-kurso estas utiligata, por informi la lernejanojn pri bona prononco de la germana lingvo. La aŭskultantoj scias Esperanton. El Finnlando oni esprimis la deziron je prelegoj informantaj pri germanaj aferoj. Germanoj el la ĉeĥoslovaka respubliko skribis, ke ili ĝoje salutas la kurson, sendatan de germana stacio; senteme tuŝas la tiel montriĝanta lingva ligiteco kun la lingva hejmlando.

La unua kurso finiĝos en fino de Junio. Kiagrade la kurso spertos evoluigon kaj daŭrigon, tio dependas de deziroj de l' aŭskultantaro. Ĉu oni deziras progresigan kurson, ĉu komenciĝu nova kurso por komencantoj, ĉu ekzistas sufiĉa intereso por ambaŭ? Kompreneble; kurso por komencantoj trafos nur germanlingvanojn; sed progresiga kurso trafos ĉiujn, kiuj deziras perfektiĝon en la praktika uzo de Esperanto. Ĉar laŭ natura marŝo mi iom post iom uzos ankaŭ por lingvaj klarigoj Esperanton, samtempe enkondukante la aŭskultantaron en la movadon kaj literaturon.

Al la diverslandaj grupoj, asocioj k. s. prezentiĝas favora kaj oportuna okazo, regule esti informataj pri Esperantujo kaj krome pliperfektiĝi en la lingvo-scio. La diverslandaj grupoj ktp. ne maltrotaksu la eblon, estiĝi kvazaŭan radio-centron por esperantiaj aferoj! Jam kelkfoje okazis radia informo pri kongresoj!

Kiel mi jam diris: la evoluo dependas de deziroj de l' aŭskultantaro, de l' eĥo, kiun trovas la esperantlingvaj dissendoj. Kompreneble ja estas, ke „Deutsche Welle" — Germana Ondo — ne volas ŝarĝi sian programon per afero ne sufiĉe ŝatata kaj taksata de la publiko. Sekve de tio mi petas ĉiun interesiton, ĉu unuopa persono, ĉu grupo, asocio, institucio ktp., ke oni bonvolu evidentigi la intereson pri esperantlingvaj kursoj aŭ dissendoj per tio, ke oni skribas al „Deutsche Welle", Berlin W 9, Potsdamer Str. 4, pri deziroj. El germanlingvaj landoj oni skribu en germana lingvo, el aliaj landoj aŭ en nacia lingvo aŭ en Esperanto. Germanlingvanoj ja prefere postulos kursojn, sed la aliaj postulos krom perfektiga kurso ankaŭ ĝeneralajn informojn per Esperanto. Oni priparolu — se plaĉas — la kulturan valoron de Esperantaj radiaj dissendoj: oni klarigu, kion oni deziras aŭdi. Ĉiu skribu tuj, ĉar kion oni faras hodiaŭ, tion oni ne bezonas — forgesi morgaŭ!

Dependas de vi, sole de vi, Esperantistaj samideanoj, ĉu vi havos Esperantan dissendon de Königswusterhausen, kies ondo 1250 estas ricevata preskaŭ en la tuta mondo, ĉu favora okazo estos preterlasata, krei radian centron por Esperantujo!

Behrendt

*

Zürich

Ondolongo 588 — Dissendo dum Septembro

Mezeŭropa horo: 19,30—20 horo

5-a: Prof. D-ro E. Müller (en germana lingvo): Esenco kaj celo de Esperanto.

9-a: Robert Gsell, inĝeniero de Federala Aeroficejo Svislanda en internacia aertrafiko. (Tradukita kaj parolota de Rud. Unger.)

16-a: Emil Ermatinger, universitata profesoro, Zürich: Zürich dum la milito kaj hodiaŭ. (Tradukita kaj parolota de Rud. Unger.)

23-a: Ministro Junod, direktoro de la Svisa Turisma Oficejo Centra en Zürich: Vintra sporto en Svislando. (Tradukita kaj parolota de Rud. Unger.)

30-a: Prof. D-ro E. Müller: Homaranaj libroj de svisaj verkistoj (daŭrigota).

Ciudimanĉe je la 22,10 horo (vespere 10,10 h.) telegramoj de la „Neue Zürcher Zeitung" en Esperanto.

En kelkaj finioj . . .

* Esperantistaj fervojistoj en Graz (Aŭstrio) invitas samprofesiajn kamaradojn dum Oktobro. Programo kaj informoj riceveblaj de Jozefo Schwarz, Prankergasse 64, Graz.

* Esperantista Klubo en Praha (adreso: S-ro F. Novak, Malé nam. 10, Praha I) aranĝas jubilean ekspozicion. Danke akceptas objektojn: PI bfl., brodaĵojn, manlaboraĵojn, artobjektojn, esperantajn librojn, sed ne flugfoliojn kaj propagandilojn. Ĉio resendota post fermo. Elspezoj repagotaj.

* En N-ro 321, paĝo 103, aperis informo pri premio, kiun ricevis nia samideano S-ro Raymond de Rienzi en Paris. Sed pro stranga neatento la titolo de la premiita romano kripliĝis. Ĝi estas: L'Aventure sur la Route, roman d'une faible femme et de sa petite auto (La aventuro sur la strato, romano de malforta virino kaj de ŝia malgranda aŭtomobilo).

Red.

* Universala Framasona Ligo aranĝas la 8-an Internacian Manifestacion Framasonan la 1-an ĝis 2-an de Oktobro en Basel. Ĉiuj FF. de regularaj ritoj, aliĝu al nia ligo (kotizo 2 sv. fr.) kaj vizitu nian kongreson. Oni sin anoncas ĉe Fr.: Eugen Lennhoff, 53. Boeklinstrasse, Wien II. FFr. samideanoj venu multnombre. Kun fr. saluto D-ro Fr. Uhlmann, prezidanto de la ligo.

EL NATURO KAJ SCIENCOJ

Persa fervojo

En landoj politike kaj finance ne evoluitaj la konstruado de fervoja liniaro estas problemo de la ekstera politiko. La necesa mono, donita de fremdaj kapitalistoj havigas al ili certan influon. La fervoja linio kreita ankaŭ faciligas la transporton de invada armeo kiel same la pacan intersanĝon de komercaĵoj. Pro tio tiaj fervojkonstruoj havis ofte longedaŭrajn politikajn preludojn en kiuj fariĝis du luktoj: inter la konkurencaj influ-serĉantaj potencoj fremdaj unuflanke, inter ili kaj la fervojbezonanta lando aliflanke, kiu eluzante la rivalecon de ambaŭ konkurantoj, serĉas mildigi la kondiĉojn kiom eble plej profite. Ekzemplo de tiu-ĉi taktiko estas ja la Bagdada fervojo kaj la konstruado de fervojoj en Ĉina imperio.



Ofte estas malfacile difini, kiu partio en tiu-ĉi montrita lukto pli forte prokrastigas la efektivigon de la celo, aligi tiujn landojn al la trafika retaro. Ofte la progresemo kaŭzas idean konflikton pro la atendebla dependigo de l' eksterlando. El tio klariĝas ke lando ne malriĉe dotita de la naturo kiel Persio ĝis nun ne havas fervojon, escepte la kelkkilometra linio ĉe la kaŭkaza limo — Ĝulfa ĝis Tabriz. La premo norda (rusa influo) kaj la premo suda (brita influo) malebligis ĉiun tiurilatan decidon de la registaro.

La milito malfortigis tiun premon. La divido en tielnomataj influsferoj foriĝis. La lando fariĝis pli libera en la propraj decidoj pri eksterlandaj rilatoj kaj ankaŭ en la financaj dependoj. Signifa pro tio estas leĝo de la jaro 1923, laŭ kiu la koncesioj pri petrolo, trovebla en la kvin nordaj provincoj, estas donotaj nur al usonaj societoj. Plie la persa registaro vokis fervojan spertulon en la persono de S-ro Poland, usonano. La seriozeco de la plano konstatiĝas en tio, ke la registaro enkondukis monopolon por teo kaj sukero, kun la nepra kondiĉo, ke la profitoj de tiuj monopoloj estu ekskluzive uzotaj por la financigo de estonta fervojaro.

Dum tiu-ĉi jaro — 24 februaro — la persa parlamento entreprenis la decidan paŝon, rajtigante la registaron per leĝo je la tuja prilaboro de granda programo por konstruado de fervojo, nomo de la Nord-Suda Linio. La konduko de tiu-ĉi linio, jam plurfoje ŝanĝita en antaŭaj projektoj nun prezentiĝas jene: De Bender-Gez, ĉe la sud-orienta angulo de l' Kaspia Maro, iranta sud-okcidenten al Teheran kiel unua sektoro longa 350 km. De tie-ĉi en la sama direkto kaj rekta linio al Hamadan. Do ne tra Kazvin. De Hamadan al sudo trans Buruĝird, Horamabad, Disful, Ahvaz ĝis Muhamera ĉe la Persa Golfo, tute ĉe la limo de Irak. Kiel kompletigo servos la pli malfrue konstruota linio de Teheran al Enzeli ĉe la Kaspia Maro.

La tuta kosto de la Nord-Suda linio, longa 1700 km estas taksata je 15 milionoj da britaj funtoj (ĉ. 75 milionoj da dolaroj). La enspezoj el la monopoloj atingas jare unu milionon da funtoj (kvin milionoj da dolaroj). El tio rezultas, ke la propra financigo enlanda kaŭzus tian longan konstrudaŭron ke la ekonomia efiko forestus por longa tempo. Sed sufiĉas la nomita financa fonto kiel garantio por la interezoj pagotaj por pruntoj elmetotaj sur usonaj aŭ eŭropaj borsoj. Tio igus ke la efektivigo nur dependus de la teknikaj konsideroj. Laŭdire ekzistas jam la certigo ke usona prunto de 20 milionoj da dolaroj efektiviĝos por la unua sektoro de Bender-Gez ĝis Teheran Ke la konstruo efektive komenciĝos montras la forveturo de la fervoja spertulo S-ro Poland al Bagdad, kiu tie akceptos dekduon da usonaj inĝenieroj.

Oni do rajtas jam konsideri la politikajn eblecojn kaj efikojn de tiu-ĉi konstruprogramo. Ili esprimiĝas ĉefe en la rilato de la Persa imperio al la Soveta respubliko kaj Britlando.

La Soveta Unio certe interesiĝas pri la unua sektoro kaj ankoraŭ pri la kompletigo de Enzeli al Teheran: ĝi laŭgrade plifortigas la ekonomian direktiĝon de Norda Persio al la Soveta Unio. Ju pli la fervojo iras al Sudo despli malgrandiĝas la intereso de la norda najbaro. La atingo de la Persa Golfo per la fervojo permesas al Persio respondi la ekonomian premon el Nordo al la suda eliro aŭ konkrete dirite, la transporton de eksportaĵoj el la riĉaj nordaj provincoj — kotono, lano, rizo, migdaloj — al la Sudo kaj al la maro. Tiu-ĉi ebleco instigas ankoraŭ pli rapidan efektivigon ĉar jam de unu jaro la persa eksporto al Sovetio paraliziĝis dank' al enporta blokado. Povas esti ke la konstruo efektiviĝos de du flankoj, do ankaŭ el la suda direkto.

Por la britaj interesoj la suda sektoro ja estas pli avantaĝa, ĉar ĝi permesas rektan komunikon al la petrolkoncesioj posedataj de britaj societoj. Tamen ekzistas fortaj argumentoj kontraŭ la nord-suda direkto de la fervojo. Antaŭ ĉio suferus la britaj interesoj en la mandatŝtato Irak. Kun sufiĉa zorgo oni vidas en Bagdad, ke la transitkomerco al Persio el kio ja vivas la plej granda parto de la vilajeto, malaperus pro la nurpersa interligo de Muhamera al Teheran. Sed multe pli grava estas la kruciĝo de la grandaj imperialismaj interesoj. Ili postulas okcident-orientan transiron, la mankanta ligilo de la Mediteraneo al Hindio. Ĝiaj kompletigoj Bagdad-Haifa unuflanke kaj tra Beluĉistano ĝis la Hinda limo aliflanke estus tiam facile realigeblaj, ĉar ili ja troviĝas en brita sfero. La brita gazetaro memorigis, sekve de la nunaj traktadoj, al la jam ekzistinta ideo de okcidenta-orienta konduko: Kasr-i-Ŝirin (Irak-limo) Kermanŝah, Buruĝird, Isfahan, Jezd, Kerman, Ĉabar (Golfo de Oman, proksime de la limo al Beluĉistano). Sendube la brita diplomatio klopodas per ĉiuj eblaj rimedoj je konsidero de siaj specialaj deziroj. Verŝajne oni proponos alkondukajn linojn eble de Isfahan kaj Kermanŝah al Buruĝird, sed la nuna pronacia vento en Persio al kiu aldoniĝas financaj konsideroj ne favorigas tiun ideon.

Konklude: Estas sendube ke la nuna registaro persa faros sian plejeblon por la efektivigo de la plano. Nedubebla ankaŭ estas la komplikaĵoj kaj malhelpoj renkontotaj. Ĉiuokaze la afero meritas plenan atenton de l' okcidento. Persio kiu praktike ankoraŭ estas nekonata lando, ĉar neniel ligita al la okcidento, kontaktiĝus kun ĝi kaj antaŭvidebla estas la ebleco de moderna vojaĝo al la lando de l' arĝenta leono kaj leviĝanta suno.

(H. J.)

NOTOJ

La eltrovinto de la bonfara poŝtmarko. Antaŭ nelonge mortis en Danlando S-ro M. Holboel, okupinta altan oficon en la poŝta servo dana. Al li la mondo dankas la inventon de la bonfara poŝtmarko. Antaŭ proksimume 20 jaroj Holboel havis la ideon, uzi la poŝtmarkon por la helpo bonfara. Je lia instigo la dana poŝto eldonis la unuajn bonfar-poŝtmarkojn, kies profiton oni uzis por kontraŭbatalo de la tuberkulozo. De Danlando la bonfara poŝtmarko rapide enkondukiĝis en aliaj landoj kaj formas hodiaŭ tre ŝatatan objekton de specialkolektistoj.

Leksikono de la eksterlandaj revuoj. La Faka Unuiĝo de la Germanaj Libristoj en Leipzig (Börsenverein der Deutschen Buchhändler) preparas novan publikaĵon kiu respondas al efektiva bezono. Temas pri Adresaro enhavanta la plej konatajn sciencajn kaj popularajn revuojn kaj gazetojn en negermanaj landoj. Ĝi enhavos ĉirkaŭ 5000 titolojn. Tiu ĉi verko estos paralelo al la Sperling-a Adresaro de revuoj kaj gazetoj, la leksikono de la germana gazetaro, kiu ankaŭ aperas ĉiujare en la sama eldonejo de la Librista Unuiĝo. Analoge al tiu ĉi adresaro la nova leksikono raportos ĉion sciindan pri la eksterlandaj periodaĵoj: Eldonejo, eldonanto, redaktoro kun iliaj adresoj: apermaniero, abono, indikoj pri kosto de anoncoj kaj la kondiĉoj pri recenzoj. Ĝis nun tia leksikono ne ankoraŭ ekzistas kaj ĝi certe renkontos grandan intereson ĉe verkistoj, scienculoj kaj eldonistoj.

Instituto pri gazetaro. Fondiĝis en Heidelberg laŭ instigo de la Germana Unuiĝo Gazetara instituto universitata pri la gazetaro. Ĝi servas al la scienca esploro de ĉiuj problemoj en la gazetaro. Specialan atenton oni donos al la evoluigo de Gazetara Scienco sur sociologa bazo. La instruplano enhavas la peradon de la aktualigitaj sciindaĵoj el ĉiuj gravaj specialfakoj kaj de la praktika gazetara scio. Plie la pridiskuto de publicismaj problemoj. Scienca kondukanto de la instituto estas profesoro v. Eckardt, kiu direktas katedron pri publicistiko (publicista praktikado). Inter la aranĝoj de la instituto estas rimarkinda la arkivo kiu enhavas kolekton de ĉiuj gazetoj en- kaj eksterlandaj kaj plie kolekton de specimenoj kun jam pli ol 1200 ekzempleroj de periodaj gazetoj kaj revuoj. La biblioteko enhavas literaturon pri la gazetara scienco, ĉiujn rilatajn verkojn kaj leksikonojn.

H. J.

Baneja ekspozicio en Budapest. Dum 1929 oni intencas aranĝi en Budapest grandegan ekspozicion pri balneologio, banejoj kaj fremdultrafiko, kiu estus tial tre taŭga, ĉar en tiu urbego estas multaj sanigfontoj, termalbanejoj, strandbanejoj kaj luksaj banejoj kun mineralakvo. Ĝis nun tio estis malmulte konata en aliaj landoj. La ĉefa ekspozicio estus sur la monto Gerhardo apud la Danubo, en la mezo de la urbo. Granda levilo (lifto), kiu portos samtempe 100 homojn, funkcius sub la monto ĝis supren kaj la ekspoziciejo estus kunigita kun grandega kongresejo, kie estus la fremdultrafika, balneologa kaj eble ankaŭ la esperantista mondkongresoj.

La plej grandaj posedaĵoj tutmondaj. Laŭ komparo de la gazeto New York Times la plej riĉaj homoj estas nuntempe:

	Milionoj da Dol.
Henry Ford (Aŭtomobilo)	1200
J. D. Rockefeller (Petrolo)	600
Andrew W. Mellon (Banko)	200
Duko de Westminster (Terposedaĵoj)	200
E. S. Harkness (Petrolo)	200
Basil Zaharoff (Industrioj)	125
Gaekwar of Baroda (Terposedo)	125
Payne Whitney (Fervojo, Banko)	100
Georg F. Baker (Banko)	100
Vincent Astor (Terposedaĵo)	100
F. W. Vanderbilt (Fervojo)	100
Ph. B. Walker (Ligno)	100
Barono H. Mitsni (Ŝiparo)	100
S. Y. Patino (Stano)	100
Alfr. Loewenstein (Minejoj, Ŝiparo)	100

Por viaj rilatoj
kun Delegitoj de UEA kaj por
malgrandaj pagoj uzu senescepte la
ESPERANTISTAN RESPONDKUPONON
eldonitan de UEA!

LITERATURO

Libertempo

Mara bordo kun hoteloj,
Pavilonoj kun terasoj,
Kie sur salikfoteloj
Lacertumas ĉiuj rasoj . . .

Ŝajno, ŝajno, pantomimoj,
Nek senzorgo, nek ripozo!
Amelitaj modviktimoj,
Via paco estas . . . pozo!

Car monduma stulta kodo
Ankaŭ tie ĉi rigoras,
Kaj la sklavoj de la modo
Libertempe nur . . . deĵoras

Kaj kompatas min, barbaron,
Kiu ŝatas nur kamparon
Sen deviga kostumŝanĝo
Post kaj antaŭ ĉiu manĝo!

*

Ho benata nest' vilaĝa
Nelekata de l' kulturo,
Virga ĉarmo, ĝoj' sovaĝa
Hejmas meze de l' naturo;

Kaj neniu aŭtomato
Negre bruas en „dancingo“,
Nek radio-aparato
Kurzojn krias de l' sterlingo!

Pura estas ĉiu herbo,
Sanon portas ĉiu colo,
Korpo tie ĉi kaj cerbo
Ĝuas pacon de l' izolo . . .

Mi sopiras nostalgie
Al ĉi tiu nesto, kie
Kampa vivo kaj ferioj
Ne jam estas „industrioj“!

Raymond Schwarz.

Ruĝaj kandeloj

De *E. Tinkler*, Carnforth, Anglujo.

Laŭ la afabla permeso
de la aŭtorino kaj de la „Manchester Guardian“.

Hodiaŭ nokte staras sur mia tablo du ruĝaj kandeloj, ĉiu en alta arĝenta kandelingo. Rigardante supren al la fenestro mi povas vidi la rondan oran lunon aŭtunan. Brilante tra la vitraĵoj ĝi ĵetas sur la plankon desegnon de dekses malgrandaj kvadratoj kaj ĝia lumo tuŝas la arĝenton. Sed por esti forte ravita de simpla ĉiutaga afero vi devus vidi ĝin kiel mi ĝin vidas en la nuna momento.

En ĉi tiu sezono de nia jaro, kiam
Bartolomeo la sankta
Portas la roson malvarman
estas ja agrable kaj gajige almeti al la vespera fajro alumeton, lumigi la kandelojn, kaj el la krepuska horo fari memoron — la memoron pri certa ĉapitro legita, pri letero skribita — aŭ kun peco da trikaĵo en la fingroj, horon da pensado pri amiko. Ni perdas la arton esti kvietaj, kvazaŭ io estas en malordo, se ni ne ĉiam estas aŭ irantaj aŭ venantaj . . .

Dum estingiĝas la vespera ĉielruĝo, la luno nun brilas pli kaj pli hele en la kvietan ĉambron. La kurtenojn oni neniam kuntiras ĝis plene mallumiĝis; ĝis la arboj perdiĝis en la nokto. Sed hodiaŭ nokte estas klare kaj brile, kaj la kurtenoj restas malfermitaj — plene malfermitaj — por ke la okulo povu ĝui la kontraston inter lunlumita ĝardeno kaj fajrlumita ĉambro.

„Kiam mi havos domon“, diris saĝa infano, „ĝi estos plena de libroj kaj ĉirkaŭata de floroj.“ Oni demandas al si, ĉu la deziro iam efektiviĝis aŭ ĉu la infano kreskinte ĝis virineco trovis sian revon ankoraŭ neplenumita.

La ordo de la tago ŝanĝiĝas kun la paso de somero. Ne estas sole la urbanoj, kiuj malfrue enlitiĝas. Sur la kamparo ni antaŭrigardas al la longaj vintrovesperoj, kaj ni plilongigas ilin, restante eksterlite ĝis pli malfrue — ofte ĝis noktomezo. De tempo al tempo ni rigardas tien kaj reen sur la vojo kaj faras rimarkojn pri iu najbaro, kiu estas tiel malfrua kiel ni. Aŭ ni vidas transe ĉe la farmdomo lumon, kiu ekbrilas el la fenestro de la malnova sidoĉambro. Subite ĝi estingiĝas, kaj baldaŭ ŝanceliĝa flagreto montras, ke iu portas kandelon laŭ la koridoro supre. Ni kampar-loĝantoj tiom interesiĝas pri la lumigado de la najbaraj fenestroj, ke kelkafoje oni demandas al ni, kial hieraŭ nokte estis tri lumoj, kie ordinare estas nur du. Kaj ni provas diveni la kaŭzon. Eble nur pordo ne tute fermita, kiu tralasas radion de lumo. Tiel malproksimen eĉ malgranda kandelo ĵetas siajn radiojn.

Ĉi tie sur la kamparo, antaŭ ol aranĝi feston, dancon, aŭ kunvenon, oni nepre demandas ĉu estos lunlumo. Tiam ni aranĝas la aferon tiel, ke la luno lumigu al ni la vojon hejmen, ĉar sur la vojetoj ne troviĝas lanternoj, kaj ni fidas al nia fratino, la luno, por ŝia helpo.

Endome ni havas kandelojn kaj lampojn. „Ĉu vi ne trovas, ke lampoj ĝenas vin?“ Jen demando, kiun oni ofte metas al ni. Eble ni ne estas tiel verdiraj kiel ni povus esti. Ni evitas rektan respondon.

„Nu, ili ja postulas iom da atento . . . .“ Ni neniam konfesas plu. Nur kiam la vizitanto decidiĝis je longa restado, povas okazi iun vesperon, ke neniu memoris plenigi la lampon. „Ne grave“, ni diras, „estas jam tro malfrue. Ni havu la kandelojn.“ Tiam per la vaksa kandeleto ni lumigas unu post alia la du ruĝajn kandelojn en la altaj arĝentaj kandelingoj sur la tablo, du sur la piano kaj du aliajn aliloke. Ĉe mia kubuto staras malgranda sed tre alta mahagona tablo, kiu ĉirkaŭiras la ĉambron kun mi. Ĝi havas ĝuste sufiĉe da spaco por kandelo kaj libro, sed je la kuŝiĝa horo mia taso da kakao anstataŭas la libron. Kiam ĝi estas en kamarada humoro, la kato plezure sidas tie dekstre de mi kvazaŭ sur piedestalo kaj facile atingebla por karesado.

La horloĝo en la turo brue sonoras, batante ne nur la horojn sed ankaŭ la kvaronojn. La preĝejo staras ĉe la supra fino de la ĝardeno, kie antikva filiko-kovrita muro formas limon inter ni kaj la Kampo de Dio.*) Ĵus batis la deka horo. Pasis nur kelke da semajnoj, de kiam en la nuna horo ni promenis en la ĝardeno sub ĉielo ankoraŭ luma, serĉante limakojn sub la rokejaj ŝtonoj aŭ ĉirkaŭligante la pezajn florkapojn. Nun, post la subiro de la luno, se iu havas malfruan leteron por la poŝto, ni deprenas la lanternon de malantaŭ la pordo, enmetas stumpon de ruĝa kandelo, kaj tiel lumate eliras en la veluran mallumon. Kiel sonĝosimila aspektas la ĝardeno sub kandela lumo; kvazaŭ la floroj subite surpriziĝis el sia dormo. La floksoj ŝajnas nur okuloj: kaj la trikolorvioloj, mi povus aserti, turnas la kapojn por rigardadi dum ni preterpasas laŭ la rosbriletanta lavenda aleo. Sur la vojeto superpendantaj arboj plidensigas la mallumon; sed la gaja lumeto, kiun ni portas, elĵetas fantaziajn briletojn, farante belaj kaj interesaj eĉ la ŝtonojn nerimarkitajn en la tago. Kunikloj rapide transkuras la vojeton. Vesperto, konfuzita de la lumo, subite frapas nin, zumante; kaj la blankaj strigoj, flugetante, eligas sian malgajan krion. Kaj, pensante pri nia propra fantomo, kiu laŭdire sorĉigas la malnovan ĝardenon, ni rapide revenas, timante aŭdi malantaŭ ni tiujn sekvantajn paŝojn, kiuj, unufoje aŭdite, ne facile forgesiĝas.

Jen la brilplena fenestro kaj interne la familia grupo leganta sub la lumo de ruĝaj kandeloj. La granda fago subite balanciĝas kaj knaras dum preterblovas furioze la mara vento.

Fermu rapide la pordon!

Trad. *Rhodes Marriott.*

---

*) „God's Acre“, esprimo uzata en la angla lingvo por tombejo, ĉirkaŭ preĝejo.

TRA LA LIBRARO.

Detala raporto pri iu publikaĵo okupus tro ampleksan lokon en nia gazeto. La eldonaĵoj estas bibliografie notataj en la rubriko „Novaj libroj“. Sub titolo: „Tra la libraro“ aperos ne plenaj sciencaj prilingvaj recenzoj, ĉar multaj aliaj gazetoj jam daŭre komisiis al lertaj kunlaborantoj tiun tre utilan laboron, sed pli simplaj ĝeneralaj impresoj de nura leganto, celanta informi aliajn legantojn pri la enhavo de la plej rimarkindaj novaperintaj verkoj.

Nia movado. — Literaturo. — Humoro. — Religio. — Diversaĵoj.

Tre bonan ideon ekhavis S-ro Grenkamp kaj de Lajarte, kiam ili ricevis de la prezidanto de nia Akademio permeson kunigi kaj presigi kolekton de liaj artikoloj, eltiritaj el diversaj verkoj kaj paroladoj, sed ĉefe el la iama bona revuo Lingvo Internacia. Ĉiam firme kaj konscie sin tenis S-ro Cart al principoj, kiujn li opiniis nepre necesaj por nia sukceso: plena fideleco al la fundamento, libera nesistema lingva evoluo, Esperanto vivanta lingvo kaj grava socia problemo. Multaj estos tre kontentaj retrovi en *Vortoj de Profesoro Th. Cart* la konvinkan argumentaron de unu plej inda posteulo de la Majstro; mirinda vigleco ĉe nia nejuna gvidanto rajtigas esperi, ke ne testamenton li tiel lasas al ni, sed postrigardon naturan post bone plenumita laboro; lian konsilaron, longa aganta spertado igas tre konsiderinda. Du bonaj portretoj ornamas tiun serion da tekstoj aperintaj dum pli ol dudek jaroj kaj la libro estas tre bele presita kaj eldonita.

*

Dibuk estas titolo de originala teatraĵo verkita en juda lingvo, kiu temas ankaŭ pri hebreaj moroj, tradicioj, kredoj kaj eĉ superstiĉoj. Tre aparta gento kaj vivo aperas antaŭ ni kaj igas la dramon kvazaŭ etnologie interesa. Ĉe unua tralego, iom ĝenas abundeco de neesperantigitaj fakvortoj aŭ personnomoj; superinte tiun bareton, la leganton kaptas tre stranga medio kaj idearo kaj li streĉe ĝisfine plulegas. Dibuk estas spirito de mortinto, kiu povas ankoraŭ agi ĉe vivantoj, kiun oni devas pelsorĉi per religiaj misteraj sakramentoj. Ĉar ĝi turmentas fianĉinon kaj fine mortigas ŝin, ankaŭ romaneca estas la dramo. Ni ne detalas ĝian enhavon, por ke multaj legontoj ĝin mem plezure malkovru. La traduko estas tre bona, krom kelkaj eble superfluaj neologismoj. Ankaŭ allogas la malalta kosto de l'libro, unua el la promesata pure beletrista kolekto; sed persone mi plivole pagus kelkajn spesojn pliajn, por ke oni uzu pli bonkvalitan paperon.

Unua numero el dua serio de Biblioteko Tutmonda ankaŭ dronigas nin en tute fremdan mondon, ĉi foje en la antikvan egiptan per elĉerpaĵoj el *Grekaj Papirusoj*. Tre instrua antaŭparolo informas pri trovo, deveno, lego kaj temo de la papirusoj; poste diversaj tradukeroj kun klarigoj revivigas kun ĉiuj detaloj la vivkondiĉojn de loĝantoj en Nila valo kelkajn jarcentojn antaŭ Kristo. Pli bona, pli interesa historio-leciono ne povas esti; tiaj popolklerigaj verkoj meritas sukceson. Ni ne diras, ke ties lego estas tiom facila kiom ĉe ia ajn noveleto; la malfacileco de l'temo kaj traduko ne permesas tion; sed la klopodon de l'leganto rekompensas intelekta pliriĉiĝo.

Nova verketo tradukita de S-ro Edward S. Payson, *La Karto mistera*, sekvata de La mistero senvualiĝas, estas el tiuj terurigaj rakontoj, kie persista fatalo persekutas viktimon, kaj ĉi tiu, pro duobla personeco, estas samtempe honesta negocisto kaj senkompata murdisto: kompreneble tiuj du malaj animoj loĝantaj en unuopa homkorpo tute ignoras unu la alian. Do ne legu tion antaŭ ol endormiĝi: vi havas inkubsonĝojn; sed en tia speco, tiuj historietoj estas taŭgaj posteuloj de la Poe'aj elpensaĵoj.

*

Bele ilustrita albumo en kiu pli ol 150 bildoj humore desegnitaj kaj ankoraŭ pli nombraj spritaj strofoj priskribas la aventurojn de *Sinjoro Longkrurulo*, jen kio elvekos laŭtan ridadon ĉe serioza maturulo. Sian celon bone atingis S-ro Uitterdijk. Oni kompreneble ne postulu logikan intrigon aŭ senriproĉan lirikan poemon. La aŭtoro montris talentan desegnadon kaj facilan versfaron; per karikaturoj kaj ŝercoj li sukcesis en malfacila tasko ne falante en maldecan burleskajon; eble pro kelkaj oftaj aludoj al edzeca kunvivado, prudemuloj pensas la verkon pli taŭga por malnovaj geknaboj, kiel ni ĉiuj estas, ol por veraj infanoj. Tamen kun la Struvelpetro, ni nun disponas pri du bonegaj infanalbumoj.

Ankaŭ celis amuzi gejunulojn, aŭ faciligi por ili lernadon de Esperanto per bonhumora legaĵo, S-ro Bednar dank' al aperigo de *La plej bonaj aventuroj de Barono Mensogbabilulo;* la libreto estas bele presita kun bildoj; aldonata ŝlosilo esperanta-ĉeĥa igas ĝin precipe utiligebla de ĉeĥoj. Iom bedaŭrinde estas tia duobla traduko, ĉar Biblioteko Tutmonda ĝuste anoncas por aperonta numero jenan libron: La vojaĝoj kaj mirigaj aventuroj de Munchhausen; ĝi ja estas la sama, sed pli ampleksa fabelaro.

*

En broŝuro *La Kvakerismo* estas koncize dirata la deveno de la frataro, kies vera nomo estas Societo de Amikoj, ĝia celo, laboro por paco kaj socia progreso, antaŭ, dum, kaj post la granda milito. *Kiel mortis la unuaj kristanoj,* dua broŝuro, priskribas la persekutojn kontraŭ kristanoj dum Nerona tempo; letero rakontas la martiron de nobela kaj nobla romanino kristaniĝanta kaj heroe mortanta por konfesi sian kredon. En tria, *La origino de la religio,* S-ro J. Schmidt klarigas, ke nek timo al naturaj fortoj, nek fetiĉismo aŭ magio estas la fontoj de religio; ĉe tute primitivaj triboj jam ekzistas kredo al potenca superhoma diaĵo kaj, laŭ la aŭtoro, tio pruvas, ke ĉiam Dia revelacio estigas ĉiun religion.

*

Inter multaj aliaj broŝuroj kaj prospektoj, ni nur povas kelkvorte citi kelkajn; ili estas: Raporto de Rev. Gwilym Davies, *Internacia Edukado en Kimrujo,* prezentita ĉe la Praha konferenco; Paco per Lernejo; du novaj kajeroj de la *Esperantigilo* de D-ro Benson; tiu universala lernolibro per bildoj, ĉiulande uzebla, estas nun pli malmultekoste aĉetebla; ĝi vere ŝajnas tiel detala kaj klara, ke ĝi sendube ebligas senhelpan memlernadon; gvidilo en Esperanto por *Internacionalstenografio,* kunigo de la geometriaj francaj kaj de la kursivaj germanaj sistemoj; sen ia ŝanĝo de signoj ĝi povas servi, ne nur por nia, sed por ĉiuj lingvoj. Belaj ilustritaj gvidlibretoj aperis: pri Libera urbo *Danzig,* kie okazis nia lasta kongreso; pri *Tatry,* montar- kaj turism-regiono en Ĉeĥoslovakio; pri *Norderney,* marborda banloko en nordokcidenta Germanujo; pri *Neuchâtel,* lernejurbo en Svislando. Novaj prospektoj kun invito al la printempa *foiro en Frankfurt,* kaj pri la aŭtuna *Foiro en Leipzig,* tiu lasta kun interesa listo de komercaj branĉoj. Fine, nova sesa eldono de la *B.-E.-S.a adresaro* kun nomaro de ĉiulandaj korespondantoj, kaj 8a eldono de katalogo de la *Centra Esperanto-Librejo* en Hago.

*

Jarlibroj.

Du el niaj ĉefaj asocioj ree provizis siajn anojn per bone aranĝitaj, taŭge servpretaj jarlibroj.

Foliumante la *Oficialan Jarlibron de la Esperanto-Movado por 1927,* oni preskaŭ ne povas kredi la minacan averton de l' eldonantoj, ke, pro malmulto da regule pagantaj membroj, UEA estas endanĝerigata, kaj ke unua ofero estus, se vere nian samideanaron ne vekas la laŭtigata helpkrio, malapero de tiu vere rimarkinda eldonaĵo. Ni esperu, ke tian hontigan malprogreson al ni evitos kreskanta nombro de konsciaj esperantistoj kaj ĉies energia propagando por UEA.

Krom la longa adresaro de l' delegitoj kaj lokoj (kelkaj kun urbbildoj), kiu ja estas la ĉefa baza parto de l' jarlibro, ĉi tiu plie enhavas tre interesajn novajn artikolojn. En la ĝenerala parto oni precipe ŝatos la dokumentojn pri astronomio, pri rasoj kaj lingvoj en tutmondo, pri skriboj kaj stenografioj, pri monunuoj ktp. En la esperantisma parto tre atentindaj estas la ĉapitroj titolitaj: „Pioniroj", notoj pri ĉiuj iamaj laborintoj por Esperanto, „Nia Literaturo", nomaro de niaj ĉefaj verkoj kun bildoj, „Versfarado en Esperanto", lerta studo kun multaj citaĵoj. La laŭlandaj organizaĵoj estas riĉigataj per informoj pri ĉiuj landoj kaj iliaj blazonoj. Ni ja ne volas kopii ĉi tie la tutan enhavtabelon de tiu dika volumo, sed ni devas almenaŭ ankoraŭ mencii la informojn pri la multaj servoj de UEA: bibliografio, ekspozicioj, financo, gazetabonoj, informoj, kongresoj, librovendado, reklamo, respondkuponoj. Tiel utila, praktika, tiel necesa en nia movado estas UEA kaj ĝia jarlibro, ke, serioze atentigita pri la bezonata varbado de novaj membroj, nia anaro certe klopodos por la subteno kaj disvolvo de sia plej grava kunligilo.

Se, pro la politika nuna stato mankas en tiu unua adresaro reprezentantoj en Ruslando, la *Jarlibro de Sennacieca Asocio Tutmonda* kompense listigas la plej grandan nombron de siaj membroj en la Soveta Respubliko. S. A. T. kreskas rapide: la lastjara jarlibro anoncis 2060 pagintajn anojn, kaj la nunjara 4530. Krom ties plena adresaro kaj kompreneble necesaj dokumentoj, kiel: organoj, statuto servoj, statistiko, listo de asocioj, bibliografio, restas malmultaj paĝoj por originalaj artikoloj. Unu el ili proponas studindajn normigojn; kelkaj, tiu pri la dekumigo de l' tempkalkulo aŭ pri la anstataŭigo de personaj antaŭnomoj estos tre malfacile akceptataj. Oni ne miras, ke novemo inklinas la redaktantojn uzi la novajn afiksojn: mis, end, io. Mi ne dubas, ke ankaŭ tiu jarlibro de asocio, kiu estas ne nur internacia, sed volas „ignori la naciojn", estos oftege utile uzata.

13 Aŭgusto 1927. G. S.

Novaj libroj.

La Vojaĝoj kaj Mirigaj Aventuroj de Barono Munchhausen. El la angla tradukis J. D. Applebaum. Unua volumo. 1927. Biblioteko Tutmonda N-roj 13-14. Rudolf Mosse, Berlin, Esperanto-Fako. 88 paĝoj, 10½ × 17 cm. Prezo br.: tiu duobla kajero 1 RM, 1 serio (10 numeroj) 4 RM.

La Kapitanfilino. Romano. A. S. Puŝkin. El la rusa tradukis M. Sidlovskaja. 1927. Biblioteko Tutmonda N-ro 15-17. Rudolf Mosse, Berlin, Esperanto-Fako. 172 paĝoj, 10½ × 17 cm. Prezo br.: tiu triobla kajero 1,50 RM, 1 serio (10 numeroj) 4 RM.

Jozef kaj la edzino de Potifar aŭ Idoj de Merkuro kaj Eroso. Romano en du partoj, originale en Esperanto. H. J. Bulthuis, L. K. Rekomendite de E. L. A. Eldonis „Heroldo de Esperanto", Horrem bei Köln, Germanujo. 188 + 200 paĝoj, 13½ × 20 cm. Prezo: en 2 vol. br. 5 RM, en 1 vol. bind. 6,50 RM.

Du junaj fraŭlinoj kaj *Kornelino.* Du noveloj el la bonekzemplaj de Miĥaelo de Cervantes (aŭtoro de „Kiŝoto"), tradukitaj de Julio Mangada-Rosenörn. Hispana Esperanto-Biblioteko. Eldonita de la tradukinto, Glorieta de Bilbao 5, Madrid, Hispanujo. 72 paĝoj, 13½ × 19½ cm. Prezo br.: 1,75 sv. fr. (3 respondkuponoj).

Prozo el Danaj-Norvegaj aŭtoroj. Tradukita de H. Th. Thomsen. Bokforlaget „Agado", Folkets Hus IV, Oslo, Norvegio. 62 paĝoj, 13 × 20 cm. Prezo br.: 40 norv. oeroj.

Kantaro Katolika. Katolikaj kantoj laŭ komisio de la Katolika Unuiĝo Esperantista en Wien kolektitaj kaj eldonitaj de Leopold Chiba. 1927. Tyrolia A.-G. Buchhandlung, Wien I, Stephanplatz 5. 78 paĝoj, 9½ × 14 cm. Prezo br.: ne montrita.

Latvaj Kantoj en Esperanto, tradukis kaj kompilis Ed. Jaunvalks. 1927. Eldono de Liepaja Esperanto-Societo. 64 paĝoj, 10½ × 15 cm. Prezo br.: ne montrita.

La Evangelio laŭ Sankta Marko. Londono, Brita kaj alilanda Biblia Societo. 1927. 60 paĝoj, 7 × 11½ cm. Prezo br.: ne montrita.

La Individualisma Socialismo de D-ro Axel Robertson Proschowsky el Nice (Francio). Felix Lagalaure. Rasa Virina Klubo, 1 bis Rue Coutures Saint-Gervais, Paris IIIe. 16 paĝoj, 10½ × 13 cm. Prezo br.: ne montrita.

Oficiala Jarlibro de la Esperanto-Movado — 1927. 15a jaro. Universala Esperanto-Asocio, 12 Boulevard du Théâtre, Genève. 480 + XXXII paĝoj, 12 × 17 cm. Senpaga por UEA-anoj.

Jarlibro 1927, 6-a jaro, Sennacieca Asocio Tutmonda. Paris-Leipzig-Moskvo. 324 paĝoj, 16 × 16½ cm. Senpaga por S. A. T.-anoj.

Esenco de le Lingvo Internacia Esperanto. Kuraĉi-Haruo. K. K.-serio, vol. 1, N-ro 2. 1927. Kokusaigo-Kenkjû-ŝa. 18 Motozono-ĉo I, Kooĵimaĉi, Tokio, Nipponlando. 70 paĝoj, 12 × 17 cm. Prezo br. afr.: 0,40 jeno.

Das Esperanto ein Kulturfaktor. Band 7. Festschrift des 16. Deutschen Esperanto-Kongresses, Köln, Ostern 1927. Esperanto-Verlag Ellersiek & Borel, Berlin. 138 paĝoj, 14½ × 22 cm. Prezo br.: 2 RM.

El Esperanto. (Propagandilo hispanlingva.) Sociedad Cubana para la Propagacion del Esperanto. Apartado 1324, Habana, Cuba. 8 paĝoj, 21 × 28 cm. Prezo br.: ne montrita.

Rapido. Esperanto-Stenografio laŭ la oficiala germana unueca sistemo. Verkita de Karp Wallon. 1927. H. Apitz, Stenographie-Verlag, kaj Ellersiek & Borel, Esperanto-Verlag. Berlin. 32 paĝoj, 15 × 21 cm. Prezo br.: 1 RM.

Teljes Magyar-Eszperanto Szotar (kompleta poŝvortaro hungara-esperanta). Toman Janos. 1927. II-a parto. Budapest, eldono de la Hungara Esperantista Societo Laborista. 366 paĝoj. 13 × 18 cm. Prezo br.: 6 pengoj; duontole bind.: 8 pengoj.

Einführung in die Esperanto-Handelskorrespondenz. Bearbeitet von Dr. Emil Pfeffer. Tagblatt-Bibliothek N-roj 500-501. Steyrermühl-Verlag, Wien. 92 paĝoj, 12 × 19 cm. Prezo br.: 0,50 RM.

Esperanto. V 10 Hodinach. Uplna ucebnice pro samouky a kursy. Napsal Josef Bednar. Vydal Josef Bednar, Brno, Dobrovskeho ulice č 16. 120 paĝoj, 12½ × 20 cm. Prezo br.: ne montrita.

La dua legolibro esperanta kun komentarioj. Por kurso kaj memlernado. Kompilita de la Esperanto-Propaganda Asocio. Eldonis „Teusei-sja", Kameoka, Kioto-fu, Japanujo. 26 paĝoj, 12½ × 18 cm. Prezo br.: 20 senoj.

Vidaĵpoŝtkartoj el Germanujo kaj Tirolo, kun teksto en Esperanto. Berliner Esperanto-Vereinigung, Ortsgruppe Mitte. S-ro Erwin Scholz, Berlin-Karlshorst, Dorotheastr. 25. 1 serio (6 kartoj) 0,45 RM (2 respondkuponoj); 10 serioj 4 RM.

Adresaro 1927, Sudokcidentgermana Esperanto-Ligo (S. O. L.). Laŭ stato 1-a de Aprilo. Prez. Kurt Schönrich, Wiesbaden, Walkmühlstr. 25. 16 paĝoj, 10½ × 16½ cm. Prezo br.: 1 respondkupono.

Kongreslibro Soller (Mallorca), VI. 1927. 16-a Kongreso de Kataluna Esperantista Federacio. 82 paĝoj, 13 × 18 cm. Prezo br.: ne montrita.

Vojaĝoj kaj Aventuroj de Sinjoro Longkrurulo. Rime verkita kaj eldonata de Dreves Uitterdijk, L. K. Domo Zamenhof, Hilversum, Holando. 1927. Kun 152 bildoj kaj 162 strofoj. Rekomendata de E. L. A. Albumo, 80 paĝoj, 26 × 17½ cm. Prezo br.: 1,25 Sm.

Barono Mensogbabilulo kaj liaj plej bonaj aventuroj. Libere aranĝis Josef Bednar. Eldonis la aŭtoro, Brno, Dobrovskeho ulice 16, Ceĥoslovakio. 48 (+ 12) paĝoj, 12 × 20 cm. Prezo: ne montrita.

Vortoj de Profesoro Th. Cart. Al la pacaj kunbatalantoj dediĉitaj de S. Grenkamp kaj R. de Lajarte. 1927. Eldonejo „Esperantista Voĉo", Jaslo, Polujo. 140 paĝoj, 14 × 18½ cm. Prezo br.: 2,50 sv. fr.

La karto mistera. Alfaraĵo kaj tradukaĵo de la rakonto verkita de Cleveland Moffett. Edward S. Payson. 1927. British Esperanto-Association, 142 High Holborn, London W. C. 1. 44 paĝoj, 10 × 16 cm. Prezo br.: 1 ŝil. (afr.: 4 UEA-respondkuponoj je 30 c.).

B. E. S.-a Adresaro de esperantistoj en ĉiuj landoj. 6-a eldono, 1927. Bohema Esperanto-Servo, Moravany, Ceĥoslovakio. 46 (+ 26) paĝoj, 11 × 15 cm. Prezo br.: 0,50 sv. fr.

Universala Esperantistigilo de D-ro Benson. Kvina kaj sesa lecionoj. Benson school of Esperanto Inc. Newark, U. Y. U. S. A. 2 libretoj, 34 kaj 32 paĝoj, 12½ × 14 cm. Prezo: 1 leciono: 0,15 us. dol.

Kwestja Jezyka Miedzynarodowego napisal M. Trochimowski. Naklad Polskiego Akademik Towarzystwa Esperantystow, Warszava, ul. Leszno 99, m. 5. 8 paĝoj, 11½ × 15½ cm. Prezo: ne montrita.

8ste Esperanto Katalogus, April 1927. Centrale Esperanto-Boekhandel, Bankastraat 2a, s'Gravenhage. 32 paĝoj, 12 × 15 cm.

Kiel mortis la unuaj kristanoj. Eltiraĵo el „Chretienne" de J. Y. Kraszewski. Tradukita de Em. Robert. Espero Katolika. 55 Rue de Vaugirard, Paris VI. 32 paĝoj, 10 × 15½ cm. Prezo br.: 1,50 fr. fr.

Nova Pandoro. Unuakta teatraĵo de F. H. Hanbury. Parte originala, parte el la angla teatraĵeto verkita de Jessie Band, aĉetebla ĉe The British Esperanto-Association, 17 Hart Street, London W. C. 1. 16 paĝoj, 12 × 18½ cm. Prezo br.: 4 pencoj.

Grekaj Papirusoj. Kompilis kaj tradukis D-ro Julius Penndorf. 1927. Biblioteko Tutmonda, N-roj 11—12. Rudolf Mosse, Berlin, Esperanto-Fako. 112 paĝoj, 10½ × 17 cm. Prezo: 1 serio (10 N-roj): 4 germ. mk. (Tiu duobla kajero: 1 germ. mk.)

La origino de la Religio. Laŭ la faka literaturo originale verkis Jos. Schmidt. 1927. Espero Katolika, 55 Rue de Vaugirard, Paris VI. 32 paĝoj, 11½ × 18 cm. Prezo br.: 3 fr. fr.

La Kvakerismo. Mallonga skizo pri la historio kaj kredoj de la religia Societo de Amikoj, populare nomataj „Kvakeroj". T. Corder Catchpool. The Book Centre, Euston Road, London N. W. 1. 16 paĝoj, 12½ × 18 cm. Prezo br.: 2 pencoj.

Dibuk. Inter du mondoj. S. An-ski. (S. Z. Rappoport). Biblioteko Beletristika, Vol. 1. El juda lingvo tradukis Izrael Lejzerowicz, L. K. Krakow XXII. Al. Dembowskiego 10. Pollando. 90 paĝoj, 12½ × 17½ cm. Prezo br. afr.: 0,70 sv. fr.

Internacionalstenografio. Sistemo de stenografio internacia por ĉiuj lingvoj. Gvidilo en Esperanto de F. de Kunovski. Eldonita de Instituto de Internacionalstenografio, Essen-Ruhr, Lübecker Strasse 63, Germanujo. 8 paĝoj, 14 × 22 cm. Prezo br.: 1 germ. mk.

Internacia Edukado en Kimrujo. Parolado de Rev. Gwilym Davies en la konferenco „Paco per la Lernejo“, Praha, 18—19 Aprilo 1927. Eldonita Welsh league of Nations Union, 10 Richmond Terrace, Park Place, Cardiff, Granda-Britujo. 8 paĝoj, 12½ × 21 cm. Prezo: ne montrita.

Tatry. Faldfolio, 12 paĝoj, 11 × 24 cm.

Libera Urbo Danzig. Danziger Verkehrszentrale, Stadtgraben 5, Danzig. Faldfolio, 12 paĝoj, 10½ × 22 cm.

Gvidfolio tra Norderney. Eldonita de la banloka direkcio sub aŭspicioj de UEA. 16 paĝoj, 14½ × 11 cm.

Neuchâtel en Svislando. Faldfolio, 10 paĝoj, 10½ × 14½ cm.

Frankfurt a. M. Printempa Foiro 1927. Invito al la 16a Internacia Foiro. Faldfolio, 8 paĝoj, 16×20 cm.

Leipzig-a Foiro. Invito al la aŭtuna foiro 1927. Kun listo de la komercaj branĉoj. 8 paĝoj, 15 × 21 cm.

Foiro de Reichenberg. Afiŝo kaj glumarko.

El britaj kaj usonaj gazetoj.

Aŭtomobilisto proponas, ke sur ĉiu aŭtomobilo devus troviĝi listo de avertoj por la piedirantoj. — Se oni povus ilin aldoni sub la muntkadro, certe multaj personoj povos legi la averton . . . (Punch)

Laŭstatistike la nepoj de la nuna generacio havos mezan enspezon de 11000 dolaroj jare, se la progresanta ebleco je mongajno daŭras. Arego da homoj timas, ke ili naskiĝis tro frue. (Manchester Union)

Junio estas la monato por la fianĉiĝoj. La ceteraj dekunu monatoj estas destinataj por la eksedziĝo. (Wall Street Journal)

La vivo de amerikano nun havas same malaltan valoron en la stratoj de ĉina urbo kiel ekzemple en la stratoj de Chikago. (El Paso Times)

La edzeco fariĝas ĉiam pli malcerta negoco. La universitato de Michigan aranĝis nun kurson de pafinstruo por knabinoj. (New York Evening Post)

En Japanio vi povas konstati laŭ la maniero porti la harojn, ĉu virino estas edzino aŭ ne. En Usono vi eĉ ne povas konstati ĉu estas virino! (Judge)

D-ro Louis L. Dublin taksas, ke nuntempe naskita infano havas valoron de 1447 Lst. Ni konsilas al la gepatroj tuj vendi, ĉar kurzfalo estas atendebla. (Punch)

Vesuvo denove moviĝas. Mussolini ne permesas ke en Italio iu estu nenion faranta. (Tampa Tribune)

Mussolini ordonis, ke eĉ la plej malgrandaj knaboj portu nigrajn ĉemizojn. Lasu vian knabon nur unu horon tutsola, kaj li mem jam zorgas pri tio. (El Paso Times)

La nuna numero havas 32 paĝojn

*

La Oktobra numero aperos la 25 Oktobro 1927!

Esperanto en la praktiko

Gvidlibreto de Norderney

Antaŭ kelkaj semajnoj la banadministracio de Norderney komisiis min, esperantigi por ĝi gvidlibreton. Oni pretigis 20000 ekzemplerojn de la 16-paĝa kajero, kaj mi dissendis ilin al la delegitoj de UEA. La ekspedado finiĝis la 16-an de Majo; intertempe mi ricevis aron da poŝtkartoj de la adresatoj, per kiuj ili dankis pro la alsendo. La banadministracio de Norderney skribis al mi jene:

> „Ĉiutage ni ricevas demandojn kaj mendojn pri la Esperanta gvidlibreto. Ni tial estus al vi dankaj, se, per noto en la Esperanta gazetaro, vi sciigus, ke la banadministracio de Norderney jam ne havas ekzemplerojn, ĉar ili estas senreste disdonitaj.“

Ĉi tiun informon mi tuj publikigas laŭdezire. Samtempe mi dankas ĉiujn petintojn pro la intereso montrita kaj esperas, ke la gvidlibretoj venigos multajn samideanojn al bela Norderney, por ke la tiea banadministracio praktike ekkonu la valoron de per-espreanta reklamo. *Karl Minor,* L. K.

* * *

Ekspozicio de artoj kaj sciencoj

aplikitaj en medicino, ĥiurgio, farmacio, kaj saneca higieno, okazis dum la „Medicinaj tagoj de Bruselo“. Internacia Medicina Revuo ricevis Diplomon de arĝenta medalo (Sekcio de medicina gazetaro).

* * *

Provo de teknika instruado per Esperanto

Sekve de la artikolo de nia eminenta samideano S-ro Rollet de l'Isle en la decembra numero de „Esperanto“, la Direktoro de „l'Ecole spéciale des Travaux publics, du batiment et de l'Industrie“ (Speciala lernejo por Inĝenierarto, Domkonstruado kaj Industrio) en Paris, ricevis grandan nombron da leteroj, el kiuj 30 konigis intencon sekvi la anoncitan kurson pri Armbetono en Esperanto per korespondado.

Tiu ĉi lasta cifero, kvankam tre kontentiga, ne permesas elkasigi la gravajn elspezojn necesigitajn de la tradukado kaj presado la kompleta kurso. Tial la Direktoro prokrastas la aferon, dankas tre sincere la esperantistojn, kiuj respondis lian alvokon kaj petas, ke ili diskonigi lian initiativon, por pligrandigi laŭeble la nombron de la interesiĝantoj.

* * *

Fondo de Franca Societo de Esperantistaj Stenografistoj

Dimanĉon de Pentekosto kunvenis en la „Institut Sténographique de France“ en Parizo aro de Esperantistaj Gestenografistoj, kiuj post konkurso de Esperanta stenografado, fondis la suprenomitan Societon. Ĝia celo estas la propagando de Esperanto en stenografaj rondoj kaj la disvastigo de la stenografo inter la Esperantistoj. Por esti membro necesas esti Esperantisto kaj koni ian ajn stenografan aŭ stenotipan sistemon en iu ajn lingvo, loĝi en Francujo kaj pagi la kotizon de 5 frankoj

Ni insiste petas ĉiujn Esperantistojn, kiuj konas francan, Esperantan aŭ alilingvan stenografon, ke ili anoncu sin al la sekretario: S-ro Jozefo Major, 7, Avenue de la Gare, Juvisy-sur-Orge (Seine et Oise) kaj ke ili sendu sian kotizon al la kasisto, S-ro Paul Bonenfant, 21, Rue Cartault, Puteaux (Seine).

Anoncu vin por senpaga kurso de esperanta Stenografo!

* * *

TRA LA MONDO ESPERANTISTO

Saluto

de la lerneja Esperanto-klaso Gohlis-Dresden al vizitantaj geſamideanoj.

De *Walther Hahn*

Vivu Esperanto!
Gohlis-Dresden 1927
Wir lernen die Weltsprache
Esperanto!

Amikoj karaj, gastoj altŝatataj!
Nun vin salutas klaso esperanta,
geknaboj junaj, zorge instruataj
pri lingvo kaj ideo mondvenkanta.

Ni lernas kaj ni amas Esperanton.
Ni bone nian karan majstron konas.
Leterojn sendas ni en kelkan landon;
amikaj vortoj nur al ni resonas.

Ĉar ni ne lernas nur la lingvon lian,
de Zamenhof, la majstro bonkorega;
ni scias ankaŭ la enhavon pian
de la Ide' Interna valorega.

Ni estas por la paco edukataj,
por la homamo laŭ Jezuo Kristo.
Ni sekvas al ekzemploj memmontrataj
de Zamenhof, tutmonda kuracisto.

En nia vilaĝeto tre modesta,
en nia nun floranta fruktarbaro
vizitis nin gastaro gaja, festa
el la proksima esperantgruparo.

Infanaj samideanoj al vi diras
bonvensaluton el sinceraj koroj.
La esperanta klaso vin deziras:
„En Gohlis estu belaj viaj horoj!“

Ni vokas kune: Vivu gastoj niaj,
penantaj kiel ni al alta celo!
Ni volas esti geamikoj viaj
per Esperanto sub la verda stelo.“

Centra Dana Esperantista-Ligo

Oficiala Raporto (Julio-Decembro 1926)

Societo de Danaj Esperantistoj, Kopenhago. La prezidantino F-ino M. Noll paroladis en Studenta Asocio pri „La rolo de la internacia lingvo en la estonta kulturo“. Poste fariĝis diskutado, kie ankaŭ partoprenis la prezidanto de la Kopenhagaj idistoj, S-ro stud. jur. Casse.

La reprezentantino de la societo en Roskilde, S-ino W. Løvgreen, bone propagandas tie, kaj F-ino Noll faris paroladon por la Roskilda unuiĝo de komercistoj kaj kontor-oficistoj.

Longa dana artikolo „Danlando kiel turistlando“, sendita de la dana turist-societo, estas tradukita al Esperanto kaj ĝi aperis en „Heroldo de Esperanto“ la 3-an de Januaro.

Konversacia Esperantista Klubo (K. E. K.), Kopenhago, komencis sian vintran sezonon en la altlernejo de Borup, Frederiksholms Kanal 24.

La 7-an de Oktobro parolado de S-ro M. Blicher pri „Libertempa vojaĝo en Svedujo“. La 21-an de Oktobro F-ino A. Melchior kaj S-ro A. Jensen parolis pri „La Universala Kongreso en Edinburgh“. La 4-an de Novembro la prezidanto S-ro G. Hinrichsen rakontis pri „Vojaĝo al Skanio per flugmaŝino“. La 18-an de Novembro F-ino A. Mikkelsen priparolis sian libertempon en Norvegujo. La 2-an de Decembro F-ino M. Noll parolis pri „Parencismo, nacionalismo kaj homaranismo“. La 6-an de Decembro okazis la kutima kristnaska festo, ĉe kiu F-ino Tvermoes kantis kun propra liutakompano kaj S-ro P. Christiansen ludis violonon.

Aarhus Esperantoforening, Aarhus, prezidanto S-ro M. Palsberg La sezono komencis la 6-an de Septembro kaj oni kunvenis entute 9 fojojn. Membroj de la societo starigis specialan rondon je nomo „Konversacia Klubo de Aarhus“. La societo aranĝis Esperanto-kurson. UEA havas en Aarhus 9 membrojn.

Grenaa Esperantoforening, Grenaa, prezidantino S-ino M. Mammen. Tuj post la somera ferio oni enkondukis Esperanton kiel nedevigan fakon en la realan kaj la komunuman lernejon, kaj du instruistoj, S-roj J. Madsen kaj Christensen, ĉe la lernejo komencis instrui 25 infanojn.

La societo havis (en sia estraro) grandan perdon, ĉar la afabla F-ino Timm translokiĝis al alia urbo. Post ŝia forvojaĝo oni elektis F-inon Johannessen, librotenistinon.

Odense Esperantoforening, Odense, prezidanto S-ro A. Christensen. Dum antaŭa ekspozicio de diversaj komercistoj en Odense la societo luis lokon por Esperanto-ekspozicio. Ĉirkaŭ 15000 vizitantoj kaj grava propagando por Esperanto. 4 kursoj kun ĉirkaŭ 50 partoprenantoj. Gazeta servo: 24 artikoloj de 1582 linioj. La societo kunvenas regule dufoje monate.

Sonderborg Esperantoforening, Sønderborg. Ĝeneralkunveno kun nova estraro: S-ro H. Tobiesen, prezidanto, S-ro D-ro jur. Goedecke, vicprezidanto, S-ro Bonnichsen, sekretario, kaj F-ino Reimers, kasistino. Nova kurso kun 15 partoprenantoj komenciĝis. La societo havas 26 membrojn, kaj la estraro fervore laboras por bone prepari la jarkunvenon de la kolektitaj danaj Esperanto-societoj, kiun Centra Dana Esperantista Ligo dum la Pentekosto, la 5-an ĝis 6-an de Junio, okazigos en Sønderborg.

*

Reprezentantara kunveno de C. D. E. L.

La 8-an de Majo 1927

Ĉeestis F-inoj J. Jensen kaj A. Petersen, Kopenhago, S-ro M. Blicher, Kopenhago, S-ro G. Hinrichsen, Lillerød, kaj S-ro O. Lange, Odense. Forestis F-ino A. Melchior, Refsnæs, kaj S-ro M. Palsberg, Aarhus. El la programo ni citas jene. La reprezentantaro decidis sendi skribaĵon al UEA por insiste peti, ke ĝi en sia gazeto kaj jarlibro uzu la formojn „Danlando“ kaj „Kopenhago“ kaj ne „Danmarko“ kaj „København“.

La Ligo presigis 2000 kongres-foliojn kaj sendis kvanton al la diversaj danaj Esperanto-societoj.

Prof. D-ro Dietterle dankis la 11-an de Januaro pro la de C. D. E. L. kolektitaj statistikoj kaj aldonas: „Ĉu la statistika entrepreno liveros kontentigan rezultaton, tion mi hodiaŭ ne povas konstati, sed mi esperas tion.“

La prezidanto ĉe la kunveno ekhavis tri ofertojn de diversampleksaj gvidfolioj pri Kopenhago, ĉar tia gvidilo estos praktika ĉe espereble granda turista vizito en Kopenhago, aŭ ĝuste antaŭ aŭ post la Universala Kongreso en Danzig.

La reprezentantaro decidis peti la estrarojn de la danaj societoj, insiste kaj forte labori pri aliĝo de siaj membroj al la jarkunveno en Sønderburg dum la Pentekosto.

La lasta punkto de la tagordo estis eldiro de la prezidanto, ke li ne konsentas je aldono de senutila dana Esperanto-gazeto por la sub C. D. E. L. apartenantaj societoj kaj absolute de la sensignifa gazeto „La forta voko“, eldonita de al nia Ligo flanka persono, kaj tial la prezidanto petas post la ĉeso de sia funkciperiodo ĉe la jarkunveno en Sønderburg la danajn Esperanto-societojn de C. D. E. L. elekti alian prezidanton, kiu povas simpatii kun tia procedo.

Martin Blicher, prezidanto de C. D. E. L.

Esperantista Vivo

Fianĉiĝo. — S-ro *Morris De Ketelaere,* VD de UEA en Antwerpen, kun F-ino *Maria Wouters.*

Edziĝo. — S-ro *Wal Stanislaw,* sekretario de Esperanto-grupo ĉe T. U. R., membro de UEA 25334 en Boryslav-Tustanowice, kun F-ino *Karola Grünwald.*

— S-ro *Chester H. Drossman,* MA de UEA en Meota, Kanado, kun F-ino *Ethel M. Bowering.*

— S-ro *A. Prapuolenis,* Del. de UEA en Kazlu-Ruda, Litovio, kun samideanino *M. Geniušaite.*

Honorigo. — S-ino *Mannevy,* vidvino de leŭtenanto M. en Fresnes (Franc., Nord), estis distingita per la „Akademia palmo“.

Naskiĝo. — Al Ges-roj *Tuinder,* MA de UEA en Helder, Nederlando, naskiĝis filino nomata Suneto.

— Al Ges-roj *L. kaj E. Müller-Brandanberger,* ano de UEA en Zürich, naskiĝis filineto Alice Margrit.

— Al geedzoj *Pelc,* membro de UEA 27641, naskiĝis bela, sana filo nomita Krzysctof-Franciszek.

*

Oni laŭdas!

S-ro *R. Richez* en Genevo kore dankas sekvantajn delegitojn kaj samideanojn pro faritaj servoj: S-ro Michele Arabeno (Genova), S-ro A. Egg, Baden, S-ro J. Knutti, Biel, S-ro M. Schlafroth, Burgdorf, S-ino Bründler-Crisinel, Chaudefonds, S-ro P. Humberset, Le Locle, S-ro C. Bassi, Lugano, S-ro E. Scheuer, Lyss, S-ro Ch. Jayet, Morges, F-ino A. Noguet, Vallorbu.

S-ro *Hans Jakob,* Direktoro de UEA kaj S-ro *Robert Kreuz,* Ĝenerala Sekretario de la Internacia Centra Komitato de la Esperanto-Movado plej kore dankas al la organizintoj de la Franca Kongreso de Esperanto en Thiers, la grupo Verda Stelo, al la Komerca Ĉambro en Thiers kaj al la Franca Societo por la propagando de Esperanto, pro ilia samideana kaj amika akcepto kaj gastigado dum la kongreso.

S-ro *Hymann Levine* el Milwaukee, USA., kore dankas S-rojn J. J. Link kaj W. Burkarth en St. Louis pro gastemeco kaj komercaj servoj.

S-ro *Krestanoff* en Stara-Zagora, Bulgario, dankas al la Del. en Bargas, Ŝipka, Jambol, Kazanlki, Loveč, Pleven, Plovdiv, Ruse, Sliven, Stara-Zagora kaj aliaj samideanoj pro ilia kunhelpo dum lia lasta propaganda vojaĝo tra Bulgario.

S-ro *Jos. Frischknecht,* Del. de UEA en Waldstatt, Svis., kore dankas al S-roj Arabeno, Del. en Genova kaj Piatti, Del. en Milano pro afabla gvidado.

S-ino *Marie Baroch,* MA el Sleszka Ostrava ĈSR, kore dankas S-ron Atanas D. Atanasov, Del. de UEA en Sofio, lian fratinon kaj S-rojn Gaŝevski kaj Georgiev pro afabla helpo dum vojaĝo.

Al F-ino Klema Hlavačova, instruistino, Del. UEA Jungmannova n-ro 6, II, Praha-Smichov (Ĉeĥoslovakio) la Eskilstuna-esperantistoj kaj la jarkunveno de Sveda Esperanto-Federacio, okazinta en Eskilstuna dum Pentekosto, plej kore dankas por bonege kaj akurate farita servo, kiun ŝi kompleze kaj sinofere faris al ni netskribante la notojn kaj tekstojn de du kantoj.

Laŭvola enkonduko de Esperanto en la pli altajn kaj mezajn lernejojn de la Saarteritorio

Regierungskommission des Saargebietes
Abteilung für Kultus und Schulwesen
J. Nr. 11 990/27

Saarbrücken, den 18. Juli 1927

Wir genehmigen, daß an den höheren und mittleren Schulen Esperanto als wahlfreies Unterrichtsfach eingeführt wird. Wo geeignete Lehrer vorhanden sind, kann die Einführung noch im laufenden Schuljahre erfolgen. Es wäre ein Jahreskurs mit zwei Wochenstunden in einer Klasse der Mittelstufe (etwa Untersekunda) vorzusehen. Für später ist ein Ausbildungskurs für Lehrer beabsichtigt.

gez. Dr. Colling

An die Herren Direktoren der höheren Schulen;
die Herren Rektoren der Mittelschulen, und an
die Herren Vorsitzenden der Schulausschüsse (Kuratorien).

Registara Komisiono de la Saarteritorio (Traduko)
Sekcio por Kulto kaj Instruado
J. N-ro 11 990/27

Saarbrücken, 18-an de Julio 1927

Ni konsentas, ke Esperanto estu enkondukata kiel laŭvola instrua fako en la pli altajn kaj mezajn lernejojn. Kie trovas sin kapablaj instruistoj, tie la enkonduko povas okazi jam dum la nuna instrua jaro. Rekomendinda estos dumjara kurso enhavanta du lecionojn posemajne en iu meza klaso (ekz. en la malsupra dua klaso) (germ. Untersekunda: deka lerneja jaro). Kurso pli malfrue estas intencata por instruistoj.

Subskribo

Al S-roj direktoroj de la pli altaj lernejoj;
S-roj rektoroj de la mezaj lernejoj, kaj al
S-roj prezidantoj de la lernejaj reprezentantaroj.

La soveta poŝto honoras la kreinton de Esperanto per eldono de poŝtmarko

Por honori la kreinto de Esperanto, D-ro Zamenhof, la soveta poŝto eldonis specialan poŝtmarkon kies bildon ni reproduktas tie ĉi. Ni notu ke ĝis nun la poŝta administracio de U. S. S. R. eldonis memorigan poŝtmarkon al scienculo Popov, eltrovinto de l' radio kun teksto en Esperanto; la dua, estas honoriga poŝtmarko okaze de la kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda en Leningrado (1926) kaj la tria estas la nun aperinta. Plie estas uzata teksto en Esperanto sur la poŝtkartoj ordinaraj kaj sur tiuj por eksterlando kun afrankita respondo. Krom tio specialaj kovertoj (Fermita letero) kun enpresita poŝtmarko.



Рекомендъ
Вольной гор. Данциг

ЗАКРЫТОЕ ПИСЬМО
FERMITA LETERO

R MOSCOU № 932

(наименование места, где находится почта, и губернии или округа, а для станций — наименование железной дороги)

Esperanto-
(уезд или район, волость
Kongres
улица, № дома и
Кому:
(подробное наименование получателя)
Danzig

Адрес отправителя:
De M. Valentinov.
Rusio. Moskvo, Poŝtkesto № 714.

СССР USSR
1927
ESPERANTO
ПОЧТА
POŜTO
МОСКВА

Reproduktaĵo de Zamenhofa poŝtmarko kun koverto por „Fermita Letero"

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

OFICIALA INFORMILO.

Enkasigo de la kotizo 1927. Ni informas niajn Delegitojn, ke ĝis la fino de Aŭgusto 1927 ne repagis la kotizon 2500 personoj. Je la fino de la administra jaro 1926 UEA kalkulis 8500 anojn (sen la dumvivaj), el kiuj do repagis ĝis nun 6000 personoj. La proporcio de la nepagintoj do estas 30 proc. — Ni insiste petas niajn Delegitojn klopodi, ke la samideanoj ne formale eksiĝintaj realiĝu.

Deficito 1927. Pro la nesufiĉe vigla varbado ni antaŭvidas deficiton de ĉ. 10.000 frankoj. Laŭ la propono de pluraj delegitoj ni dissendis kun la jarlibro specialan alvokon por libervola egaligo de tiu ĉi deficito. Respondis al tiu ĉi alvoko la jenaj personoj pagintaj (en svisaj frankoj):

S-ro Carles Martinez Fernandez, Sevilla (grupo, delegito kaj membroj) 30.—, D-ro Sigel, Detroit (Mich.) 384.—, S-ro Karl Wagner, Hermannstadt (Transsilv.) 28.—, S-ro Dufrenne, Amsterdam (krome varbinta aron da novaj anoj) 20.—, S-ro Fröde, Borgholm (Sved.) 7.—, S-ro Paulino Santiago, Maceio (Brazilo) 25.—, S-ro Rhodes Mariott, Buxton (Angl.) 52.50, S-ro Franz Xaver Braun, Wien, 7.50, Ges-roj Merkel, Ahlen (German.), 75.—, S-ro Carlen, Kumla, 6.85, F-ino Monod, Morges, 25.—, S-ino Offerhaus, 's Gravenhage, 500.—, S-ro Josef Tichawski, Wallern 3.-, S-ro Moreau, S-ro Delwig, S-ro Vrielink, Arnhem, 9.—, S-ro Brachet, Ecull, France, 5.—, S-ro Manuel Cuesta Ibaseta (Cuba), 5.—, S-ro Naastepod, Nijmegen, 5.—, S-ro Jezclik, Praha, 1.50, sume svisaj frankoj 1189.35. (Konto P. G.: deficito 1927.) La listo estas kompletigata per novaj pagoj.

Pluraj delegitoj kaj membroj penadis varbi novajn anojn kaj al ili ni esprimas sinceran dankon.

Por kovri la deficiton, la komitato de UEA jam akceptis pasintan jaron la aranĝon de grandstila kolekto. Kvankam ni trovas, ke tia kolektado ne estas inda por asocio kiel UEA, ni tamen dissendas liston al la delegitoj por enskribi la ricevotan helpkotizon por forigi la deficiton. La nomoj de la bonvolaj helpkotizantoj aperos en la gazeto „Esperanto“.

Jarlibro 1928. Kun la nuna numero de „Esperanto“ ni dissendas la „Oficialan Bultenon“ N-ro 20, kiu informas pri la preparo de la nova jarlibro. La delegitoj atente legu tiun informaron kaj laŭcele raportu al ni. De la regula kaj rapida plenumo de nia peto dependas la pli frua apero de la jarlibro.

